



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aprilo 2017 n-ro: 16



Merhaba!

İşte Nisan sayımız !

Bu sayımızda birbirinden güzel yazılar mevcut. Her şeyden önce, "Biz Kimiz, Neler Yapıyoruz" yazısı Esperanto dilinin yararlarını anlatıyor, mutlaka okuyun.

Esperanto Sumoo'nu organizatorü Hori Jasuo'nun 2003 yılında yazdığı Esperanto'nun hayatını nasıl değiştirdiğine dair yazısını yayınladık mutlaka okunması gerekiyor. Benzer bir yazıda da Vilhelmo Luterman nasıl Esperanto öğrenmeye karar verdiğini anlatıyor. Vilhelm Le Monde Diplomatique gazetesinin Esperanto sayfasının baş redaktörü.

Türkiye'den iki hanım eperantist dergimize ilk defa kısa birer yazı gönderdi, bu konuda çok sevinçliyiz ve yazılarını yayınlıyoruz.

Ayrıca Erciyes Üniversitesinde 70 öğrenci Dil Edinimi dersinde öğretmenleri ile birlikte kendi kendilerine deneysel amaçlı Esperanto öğrenmeye başladılar. Bakalım nasıl gidecek.

Herkeseye iyi okumalar !

Saluton!

Jen nia aprila numero!

En ĉi tiu numero estas tre belaj artikoloj. Unue la artikolo "Kiu ni estas, kaj kion ni faras" estas tre grava pri la avantaĝo de Esperanto. Tre indas legi ĝin.


Ni publikigas artikolon de Hori Jauso, la organizanto de Esperanto Sumoo, el la jaro de 2003, en kiu li rakontas pri kiel Esperanto ŝanĝis sian vivon. Ĝi meritas esti legata. En alia samsimila artikolo Vilhelmo Lutermano rakontas kiel li decidis lerni Esperanton. Vilhelmo nun estas la ĉefredaktoro de la Esperanto retpaĝo de la gazeto Le Monde Diplomatique.

En ĉi tiu numero, du el niaj esperantistinoj sendis malgrandajn artikolojn por la unua fojo, do ni ĝojas pri tio kas publikigas ilin.

Plue en Erciyes Universitato 70 studentoj kune kun sia instruisto lernas Esperanton kiel eskperimento en la leciono de Lingvo Akirado. Ni vidos kiel la eksperimento evoluigos.

Bonan legadon al ĉiuj!

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Prezento de Esperanto al ne-esperantistoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Kio ni estas kaj kion ni celas (3)	4
Dulingveco	6
Gramatiko - Lingvaj Respondoj (3)	6
Esperanto kaj Mi - Jasuo HORI	8
Poemoj de Maria Nazaré Laroca	8
Puzloj - Başak Aray	9
La Du Pinarboj	9
Mallonga Historio de Filozofio (15)	10
El la libro de "Dao de Jing" (9)	11
Koloroj el diversaj popoloj - Bulgarujo	12
Mi partoprenis en YO!Fest 2017-Fatma Eroğlan	12
Mi estis aktivulo kontraŭ Esperanto	13
Revoj de la Blanka Kolombo - Elena Popova	15
Hajkoj de Hirotaka Masaaki (Vastalto)	15
Intervjuo de Boris Kolker por Formoza Folio	16
Dankon Amiko (3) - de Claude Piron	18
Internacia Tago de Virinoj - 8-a de marto	19
Litova Kuirarto	20
Ĉu vi vojaĝos kun via dorlotbesto?	21
Kebekio: Ĉi tie ŝajne troviĝas la plej frua pruvo de vivo sur la Tero	21
Ŝercoj	22
Kurĉvort-enigmo	22
La 102-a UK en SEULO	23
La majstro Mortis! - 14-a de aprilo	24
Simpozio en Poznan kun la temo: Lernanto en la Lingvolerna Procezo	25
Heroldo stumblas, sed ne falas kaj jam planas sian jubileon	25
Slovakio invitas: SES 2017	25
Esperanto Kurso (15)	26
Renkontiĝo kun la prezidanto de TEJO	27
Fermo	28

Kursoj



- 1) La kurso en la Lernejo Ŭsküdar Amerikan Lisesi en Istanbulu daŭras.
- 2) La kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto ne okazas ĉijare.
- 3) La kurso por komencantoj en Celal

Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

4) **Nova Kurso:** En Erciyes Universitato de Kayseri urbo, 70 studentoj en la fako de Angla-instruisto, en la leciono de Lingvoakirado memlernas Esperanton kiel eksperimento pri kiel homoj lernas lingvon. Ĉu la bazo estas la denaksalingvo, aŭ ĉu iu alia dua lingvo ili jam lernis?



Prezento de Esperanto al neesperantistoj



En la 25-a de februaro en Istanbulu], la prezidanto de TEJO, Michael Boris Mandirola, instruisto Murat Özdizdar kaj pensiulo Vasil Kadifeli prezentis Esperanton al grupo de ne-esperantistoj nomita 'Gejunuloj de la klavaro'.

Ĝi estis kunveno de junaj komputilistoj pri sekureco en la komputila kaj interreta kampo. La organizanto Ziyahan Albeniz iomete lernis Esperanton kaj invitis la triopon prezenti la lingvon al tiu preskaŭ 50-persona grupo. La prezento daŭris preskaŭ unu horon kaj kelkaj el la partoprenantoj ja interesiĝis.

Vasil prezentis mallonge la historion (en la mondo kaj Turkio), Murat prezentis la lingvon mem kaj parolis pri siaj travivaĵoj en Esperantujo, kaj Michael Boris Mandirola parolis pri TEJO, IJK kaj kion ili faras en la mondo. Fine ili respondis al la demandoj de la grupo.



Ni atendas leterojn de geamikojn



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



Jam aperis la listo de legitaj libroj en la januara sumoo 2017.

En ĉi tiu sumoo

partoprenis 366 homoj, do la legitaj libroj estas multtitolaj, nome 246 titoloj.

Bonvolu viziti nian retejon kaj vidu, kiel abunda estas nia librokulturo.

Jen la ligilo de nia retejo.


<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/libroj.html>

Aleksander Zdechlik faris tiun grandan laboron. Dankon, al Aleksander!

Jasuo HORI

La 45-a marta Sumoo okazis inter la 12-a kaj 26-a de marto. En ĉi tiu Sumoo luktis du esperantistoj el Turkujo. Do la nombro de turkaj partoprenantoj post longa tempo kreskis al du sed ĉi tiu estas tre malforta atingo. La statistikojn de la marta Sumoo ni anoncos en la venonta numero.

Sube estas diplomo de la marta Esperanto Sumoo donita al perfektaj legantoj kun 15 venkoj.



UEA



N-ro 674 (2017-02-22)

Alvoko al partopreno en la Esperantologia Konferenco, Seulo,

2017

Sub la aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) okazos, kadre de la 102-a Universala Kongreso en Seulo, Korea Respubliko, la 40-a Esperantologia Konferenco, ĵaŭde, la 27-an de julio 2017 en la seula kongresejo.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/tElyiq>

N-ro 673 (2017-02-21)

Videblas konkursaĵoj por "Teo kaj Amo" kaj komenciĝas voĉdonado por "la plej ŝatataj filmetoj"

Nun videblas la filmetoj por la dua konkurso "Teo kaj Amo" ĉe <https://goo.gl/MiUKiR>, kaj komenciĝis voĉdonado por la 10 plej ŝatataj filmetoj, bonvolu viziti la paĝojn kaj doni viajn voĉojn.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/oZOKfv>

N-ro 672 (2017-02-18)

Mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ino Irina Bokova, okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, la 21-a de februaro 2017

Okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, Unesko rekonfirmas sian kompletan engaĝiĝon por lingva diverseco kaj multlingveco. Lingvoj esprimas tion, kio ni estas, ili formas niajn pensojn kaj identecojn.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/vkXARi>

TEJO



12 Februaro 2017

YO!Fest 2017

La 7-an de februaro, TEJO

partoprenis en YO!Fest 2017 en Matriĥto, Nederlando.

La okazaĵo memorfestis 25 jarojn ekde la subskribo de la Matriĥta Traktato, kiu estis la bazo por la kreado de Eŭropa Unio.

Nia volontulo Ale rakontas pri la evento.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/HVzSnU>

9 Februaro 2017

Malferma alvoko : TEJO serĉas kreanton de telefona aplikaĵo

TEJO nuntempe organizas trejnadprogramojn kadre de la AEJK-projekto (Afrika-eŭropa junulara kapabligo) pri kunlaboro inter afrikanoj kaj eŭropanoj. La temo estas trejnado : kiel organizi lern'atelierojn, kiel interesigi la partoprenantojn, kiel proponi taŭgan materialon.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/4hYtnb>

9 Februaro 2017

Joanne Johns, nova komisiito pri Landa Agado en Oceanio

Kun granda ĝojo ni povas anonci ke ni havas novan komisiiton pri Landa Agado en Oceanio: Joanne Johns!

Vic-prezidanto de la Melburna-Esperanto Asocio, estrarano de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, kaj kunredaktoro de la nacia gazeto Esperanto Sub La Suda Kruco, Joanne celas sciigi pli da junuloj pri Esperanto, kaj certigi, ke estas sufiĉe da interesaj, amuzaj kunvenoj por ili ĉeesti.

Legu pli ĉe:

<https://goo.gl/p03zOT>

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS (3)

3. PEDAGOGIA EFIKECO

KATALIN SMIDELIUSZ Lingvopedagogo

Nur malgranda procentaĵo el tiuj kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.

Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

EN LA NUNTEMPA MONDO pli kaj pli necesa montriĝas koni fremdajn lingvojn krom la propra, nacia lingvo. La lingvolernado estas ne nur utila modo, sed ankaŭ socia neceso. Ĝi okupas grandan rolon en la lingvopolitiko de lingve ĉefe homogenaj kaj ankaŭ en plurlingvaj landoj. La tereno de la alproprigo de fremdaj lingvoj estas plejparte la lernejoj, instru- kaj edukinstitutoj de malalta ĝis alta gradoj. Alte kvalifikitaj, science kaj metodike preparitaj lingvoinstruistoj respondecas pri la sukceso. La laboro disvolviĝas surbaze de science preparitaj instrumaterialoj, helpe de modernaj, allogaj instruhelpiloj en teknike bone ekipitaj lingvolaboratorioj aŭ en la cellingva lando.

“... Tre ofte malgraŭ ĉiuj tiuj pozitivaj cirkonstancoj [...] la lingvolernantoj ne alvenas al la komunikkapablo.”



Tre ofte malgraŭ iuj, tiuj pozitivaj cirkonstancoj la rezulto restas signife pli malalta ol la atendita; la lingvolernantoj ne alvenas al la komunikkapablo.

Kio estas do la problemo? Kio mankas al pli granda efikeco? Kial iras tiom malfacile tiu procezo? Multajn respondojn ni povas ricevi el la studoj de psikolingvistiko.

Dum la lingvolernado la lernanto devas alproprigi novan kodsistemon por doni aliajn nomojn al la jam konataj aferoj, esprimi ankaŭ alimaniere siajn sentojn kaj pensojn. Sed la nova lingvo estas aŭ malsimila de la gepatra, jam konata lingvo, aŭ ĝene simila al tiu. Ambaŭ kaze la lernanto devas alfronti malfacilaĵojn. Leksike kaj strukture tro malsimilaj kodsistemoj bezonas tro da energio por la transformado, dum lernante similan lingvon parencon al la gepatra oni inklinas esti supraĵema, ne preciza. La malfacilaĵoj plej ofte seniluziigas la lernanton; la manko de sukcesosento forpuŝas lin aŭ ŝin de plua laboro.

Se la lernenda lingvo estus gramatike simpla, fonetike kaj ortografie facile alproprigebla, kaj ne havus centojn da neregulaj fenomenoj, la formuloj estus kreive manipuleblaj; post iom da sperto en la lingvo la lernanto povus kalkuli je siaj pretendoj, tiuj vere efektivigis, kaj la sukcesoj redonus la investitan energion.

Esperanto estas tia lingvo.

* Ĝia reguleco donas memfidon kaj certecon. Oni ne devas iam timi ne memori kaj malbone uzi iun regulon, kiu malsimilas al la ĝeneralaj reguloj.

reguleco donas memfidon

* Ĝia simpleco faciligas la manipuladojn de la strukturoj. Ekzemple en multaj lingvoj unu el la malplej venkeblaj aferoj estas ellerni la komplikajn formojn de la verbosistemo. En Esperanto laŭ la tempoj ĉiu verbo havas nur unu formon por ĉiuj personoj kaj nombroj. Ilin distingas nur la personaj pronomoj: mi parolas, vi parolas, li/ŝi/ĝi parolas, ni parolas, vi parolas, ili parolas. Kaj same, senescepte ĉe ĉiu verbo.

facile manipuli strukturojn

* Ĝia afiksa sistemo inspiras al kreiva, produktiva lingvouzo kaj logika pensado. Helpe de la afiksoj la parolanto povas signife riĉigi sian vortprovizon. Konante la afiksosistemon, la lernanto povas mem krei el unu vortradiko multajn aliajn vortojn: sana -> malsana (kontraŭa signifo), sanulo (persono kiu havas tiun econ), malsanulejo (loko de aŭ por tiuj homoj, kiujn karakterizas la radika eco), malsanulejestro (ĉefo de tiu loko) ktp. Bona cerba gimnastiko kaj logika ludo estas ne nur produkti sed ankaŭ deĉifri tiajn vortojn de la komunikpartnero.

inspiro al kreivo

* Alproprigante ĝin la lernanto ricevas *modelo pri la lingvo*

travideblan ĝeneralan strukturan modelon pri la lingvoj, kaj ties elementoj utiligeblas dum postaj lingvolernaj kaj lingvouzaj procezoj. Hungaro kaj japano povas al kutimiĝi al la prepozicioj, ruso kaj polo al la artikolo, italo spertos la ekziston de lingvoj en kiuj la ĉefelemento staras fine de la kunmetitaj vortoj. Lernante la sekvan fremdan lingvon, la lernanto jam scivole atendas ĉu la nova lingvo funkcias laŭ lia gepatra lingvo aŭ laŭ la alia lernita lingvo.

pli bona kompreno de la gepatra lingvo

* Ĉe la komparo de la gepatra kaj la lernata lingvoj la lernanto konsciiĝas ankaŭ pri la ĝis tiam instinkte uzitaj gepatralingvaj strukturoj; tiel la lernado de fremda lingvo helpas la lernadon ankaŭ de la gepatra lingvo. Tio multe kontribuas ne nur al lingvoinstruaj, sed ankaŭ edukaj celoj.

vortoj el multaj lingvoj

* Etimologie la leksiko de Esperanto devenas el pluraj lingvo(familioj). Tio povas helpi dum la komprena fazo, kaj la jam lernitaj vortoj riĉigas la ĝeneralan inteligentecon kaj poste povos helpi en la lernado de alia lingvo.

el sukceso kreskas lernemo

* La rapidaj sukcesoj en la lingvouzo kaj la relative facilaj ebloj esprimi sin donas grandan motivon por la plua lernado kaj kreas deziron provi alproprigi ankaŭ aliajn lingvojn. La kono de pluraj fremdaj lingvoj vastigas la scion pri la mondo kaj helpas interkompreniĝi, amikiĝi, kunlabori kun alinacianoj.

Ĉe kiuj funkcias la supre menciitaj elementoj? Al kiuj ni proponu tiucele lerni la internacian lingvon?

*Mia panjo, jam plenaĝa
En la sesdekoka jaro
Nun eklernas Esperanton.
Mia panjo, tre kuraĝa,
Sen fiero, sen fanfaro,
Kultas novan verdan planton.*



El *Por mia patrino*
en *Kontraŭte* de Marjorie Boulton,
La Laguna: J. Régulo, 1955.

Plej rimarkeblaj tiuj pozitivaj faktoroj estas ĉe infanoj, por kiuj Esperanto estas la unua fremda lingvo. Ĉe ili la malkovro de la funkcipovo de alia lingvo kaj la akiritaj pozitivaj spertoj en la komunikado en tiu negepatria lingvo signifas grandan motivigon al la lernado de la sekvaj fremdaj lingvoj.

La simpla kaj logika lingvo povas funkcii kiel enkonduka modellingo ankaŭ ĉe tiuj pli aĝaj personoj, kiuj antaŭe spertis malfacilaĵojn alproprigi iun fremdan lingvon. Post la sukcesoj en la lernado de Esperanto, lerninte universalajn ecojn de la

lingvostrukturoj, provinte metodon de lingvolernado kaj havinte pozitivajn spertojn ili ofte ekhavas emon al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj.

Pedagogiaj eksperimentoj pruvas, ke post la lernado de Esperanto signife altiĝas la efikeco en la lernado ankaŭ de aliaj fremdaj lingvoj. Ties gradoj diversas laŭ la simileco inter la gepatra lingvo kaj tiu dua (post-Esperanta) fremda lingvo. El lingvistika vidpunkto Esperanto multe pli utilas por krei ponton inter strukture malproksimaj lingvoj (por hungaroj lerni la italan lingvon) ol inter lingvoj apartenantaj al la sama lingvofamilio (por italoj lerni la francan lingvon). Tamen, ankaŭ en la laste menciitaj kazoj la rapide atingeblaj sukcesoj, la motivigaj faktoroj kaj la akireblaj homaj valoroj pravigas la investon.

Ĉu Esperanto pliigis interesigon pri fremdaj lingvoj inter finnaj esperantistoj? (en %)

Eduknivelo:	Elementa	Meza	Alta	Average
JES	86,5	65,0	63,2	71,8
NE	5,8	27,5	26,3	19,5

Rašić 1994, p. 65

Pekas tiuj, kiuj scias kaj tamen silentas pri rimedo kiu helpas atingi iun bonan celon, plifaciligas aŭ mallongigas la vojon tien kondukantan.

Senrespondece riskas tiuj, kiuj ekkonante la eliksiron almenaŭ ne provas ties veran efikecon.

Esperanto estas tia helpilo kaj ni esperantistoj pretas dividi ĝin kun la mondo.

(daŭrigota)

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS
Komentoj pri la Manifesto de la movado
por la internacia lingvo.
Publikigita de UEA, Rotterdam 1999

Dulingveco



Ankoraŭ en la dudeka jarcento troviĝis multaj gepatroj kiuj hezitis paroli duan lingvon krom la gepatra lingvo kun siaj infanoj, ĉar ili timis ke la infanoj

povus konfuzi la lingvojn kaj travivi malfacilaĵojn en la lernejo. Krome multaj spertuloj kredis ke dulingveco kaŭzas balbutadon.

Mi memoras ke miaj aŭstraj bogepatroj forte protestis, kiam ili eksciis ke mi intencis paroli mian lingvon, la anglan, kun niaj infanoj. Ili timis ke ili ne povus paroli kun la nepoj kaj avertis nin, ke la infanoj certe konfuzos la du lingvojn. Pro tio mia edzo kelkfoje parolis en la germana kaj ni ofte ŝanĝis de unu lingvo al la alia. Vespere mi aŭ mia edzo laŭtlegis librojn en ambaŭ lingvoj kaj ni ĉiuj diskutis pri la enhavo. Mi ankaŭ ĝuis kanti por ili la lulkantojn de mia lando.

Hejme niaj infanoj plej ofte parolis la anglan sed ili ofte konscie kunmiksas la du lingvojn, kelkfoje ene de unu frazo, ĉar ili bone sciis ke ni ĉiuj bone komprenis la signifon. Nur kiam ili kverelis, ili uzis pli da germanaj vortoj, ĉar ili pretendis ke la anglaj vortoj kiujn mi uzas ne estas tiel fortaj kiel la vortoj kiujn ili aŭdis en la lernejo. Krome ili inventis "sekretan lingvon" por interparoli kaj ekskludi la gepatrojn kaj aliajn parencojn de siaj konversacioj.

Tamen en la lernejo kaj ĉe siaj aŭstraj amikoj ili neniam havis problemojn paroli nur la germanan. Kiel adoleskuloj ili havis pli grandan vortriĉecon ol siaj samaĝuloj kaj rapide lernis novajn lingvojn. Ĉiuj tri studis en Aŭstrujo kaj eksterlande kaj ofte partoprenis internaciajn renkontiĝojn.

La opinioj de ekspertoj pri dulingveco intertempe ŝanĝiĝis. Multaj studaĵoj montras ke la lernado kaj longdaŭra uzado de dua lingvo havas grandajn avantaĝojn dum la tuta vivo. Neŭrosciencisto, profesorino Ellen Bialystok de la York Universitato en Toronto, atentigas ke tia regula uzado de pli ol unu lingvo trejnigas la cerbon same kiel sporto trejnigas la muskolojn, verŝajne ĉar personoj kiuj parolas pli ol unu lingvon devas daŭre elekti la konvenan lingvon laŭ situacio kaj aŭskultanto kaj subpremi la alian.

Tiamaniere dulingvaj infanoj trejnigas la tielnomatan "ekzekutivan funkcion" de la cerbo kaj plifortigas la mensajn kapablojn kiujn oni bezonas ĉe la plenumo de komplikaj taskoj, por fokusigi la atenton sur celojn kaj por elfiltru distraĵojn. Krome tiaj infanoj estas malpli impulsivaj.

Sed ĉi tiuj bonaj efikoj troviĝas ne nur ĉe infanoj. Ankaŭ homoj kiuj lernas duan lingvon pli malfrue simile profitas se ili parolas flue kaj regule dum sufiĉe longa tempo.

Eksperimentoj en diversaj landoj, ekzemple en Kanado kaj Barato, montris ke longdaŭra uzado de pli ol unu lingvo povas prokrasti la komencon de senila demenco je kvar ĝis kvin jaroj.

Neatendite, la gesta lingvo kiel dua lingvo ŝajnas esti escepto kaj ne montras tiujn rezultojn, eble ĉar oni povas uzi gestojn samtempe kun vortoj kaj pro tio ne necesas subpremi unu el la lingvoj por uzi la alian.

Sheila Spielhofer el Aŭstrio

Fonto : <https://goo.gl/tSGP8m>

(Vi ankaŭ povas aŭskulti ĉi tiun tekston en la sama ligilo)

el "Lingvaj Respondoj" de L.L.Zamenhof (3) -

Gramatiko

Deveno de la nomo «Esperanto»

... La nomo de nia lingvo ne estas elpensita, kaj jen estas ĝia historio:

Eldonante la unuan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon «Esperanto»; la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata «la lingvo internacia proponita de Esperanto». Pro

oportuneco oni komencis uzadi la esprimon «lingvo de Esperanto» (die Esperanto-Sprache); aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple «la lingvo internacia», «la internacia»), montris sin ne oportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoreblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan (ĉar sub «lingvo internacia» oni povas egale bone kompreni la Volapükon aŭ aliajn proponitajn projektojn). Baldaŭ montriĝis, ke nur la vorto

«Esperanto» (sole aŭ kun aliaj vortoj) klare diferencigas nian lingvon de aliaj, kaj multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton «Esperanto», ekzemple «la afero Esperanto», «skribi en Esperanto» k. s. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo. Vidante, ke mia komenca pseŭdonimo transiris al la afero mem kaj ke ĝi estas tre oportuna, mi baldaŭ tute ĉesis uzadi mian pseŭdonimon, kaj ĝi restis nur kiel nomo por la afero mem. La nomo «Esperanto» estas per si mem tute senlogika; sed en sensignifa kondiĉa nomo kial ni bezonas logikon?

La Esperantisto, 1890, p. 60

Pri la uzado de formoj simplaj anstataŭ kunmetitaj

La vorto «bezonesti» estas kunmetita tute regule, kaj vi povas ĝin uzadi. Sed entute ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj, se ili estas ne kunligataj, sed uzataj aparte.

La Esperantisto, 1891, p. 23

Pri la vortoj kun pseŭdosufiksoj

Kelkaj samideanoj forte malaprobis la uzadon de vortoj kun pseŭdosufiksoj «-cio», «-toro» k. t. p. (ekzemple: «civilizacio», «redaktoro» k.t.p.); ili diras, ke de tiaj vortoj ni devas preni nur la radikan formon (ekzemple: «civiliz», «redakt») kaj ĉiujn devenajn formojn uzi nur kun sufikso aŭ finiĝo pure Esperanta (ekzemple: «civilizo», «redaktejo», «redaktisto» anstataŭ «civilizacio», «redakcio», «redaktoro»). Kompreneble, se tia vorto kiel ekzemple «redaktejo», estus tute identa kun la vorto «redakcio» kaj povus ĝin perfekte anstataŭi, certe neniu el ni plendus, se la vorto «redakcio» baldaŭ malaperus el nia lingvo; sed se iu diras, ke la formoj pseŭdosufiksaj estas kontraŭ-Esperantaj, aŭ ke ili prezentas malaprobindan enkondukon de novaj vortoj, mi opinias, ke li eraras. Tiaj formoj, kiel ekzemple «redakcio», «civilizacio» estas nek kontraŭ-Esperantaj, nek novaj, ĉar laŭ la §15 de nia gramatiko ili plene apartenas al nia lingvo jam de la unua momento de ĝia naskiĝo. Ni povas esperi, ke pli aŭ malpli frue la pseŭdosufiksaj vortoj «fremdaj» fariĝos arĥaismoj kaj cedos sian lokon al

vortoj «pure esperantaj»; ni povas eĉ konsili tion; sed postuli tion ni ne povas, ĉar la diritaj vortoj ne sole havas en nia lingvo (laŭ la §15) plenan rajton de ekzistado, sed ankoraŭ dum longa tempo multaj el tiuj pseŭdosufiksaj vortoj estos pli oportunaj, pli naturaj kaj pli kompreneblaj, ol la ilin anstataŭontaj vortoj «pure Esperantaj». Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj. Estas vero, ke sekve de nia toleremeco ni por kelkaj vortoj havos dum kelka tempo formojn duoblajn (ekzemple: «evolucio» kaj «evoluo»); sed ŝajnas al mi, ke estas multe pli bone havi en la unua tempo ian «embarason de riĉeco», ol malutili al si per ia ne sufiĉe matura dekreto, elĵetante el la lingvo vortojn, kies elĵetindeco ne estas ankoraŭ por ni tute certa.

Respondo 55, Oficiala Gazeto, IV, 1911, p. 222

Pri la prefikso «re»

Ĉi tiu prefikso montras revenon al la loko aŭ al la stato, de kiu oni iris. Sekve:

1. — Se A donis ion al B, kaj la donita objekto estas denove ĉe A, ni diras, ke B redonis ĝin, A reprenis ĝin, la objekto revenis al A. Spegulo reĵetas la radiojn, kiuj falas sur ĝin. La pilko resaltis de la tero.

En ĉi tiuj okazoj "re" montras revenon al la punkto de deiro.

2. — Se mi faris ion, kaj mi ĝin faras ankoraŭ unu fojon, mi ankaŭ revenas (en mia ago) al la punkto, de kiu mi iris. Sekve ni diras refari (fari denove tion, kion oni jam faris), rekanti (ripeti kanton), rejuniĝi (fariĝi denove juna), resaniĝi (fariĝi denove sana) k.t.p.

En ĉi tiuj lastaj okazoj "re" montras la ripeton.

(Ĉi tiu klarigo estas donita de D-ro Zamenhof mem.)

L. de Beaufront, Grammaire et exercices de la langue internationale Esperanto, p. 109. Tradukis

W. Bailey.

Konatiĝi

Ni uzas ordinare la formon «konatiĝi» (= farĝi konato kun iu), sed ankaŭ la formo «koniĝi» estas tute bona (= fari sin koni ion).

La Esperantisto, 1891, p. 7



Mia patro estis esperantisto. Kiam mi estis 15-jara, li instruis al mi iom Esperanton. Kaj poste, kiam mi fariĝis universitata studento, mi mem decidis ĝin lerni. Dum 20 jaroj mi lernis pli ol de aliajn lingvojn. Estante 45-jara, mi rimarkis, ke mia vivo estas tro

mallonga por alproprigi tiom da etnaj lingvoj. Sed mi ŝatis lerni lingvojn kaj mi estis pacamanto. Por kontentigi ambaŭ dezirojn, fine, mi elektis Esperanton.

Por estiĝi bona esperantisto, mi decidis lerni Esperanton diligente. Por altigi miajn kapablojn, mi komencis du aferojn: ĉiun tagon legi tri paĝojn da Esperanto kaj skribi eseojn dufoje monate. La unuan taskon mi plenumis dum pli ol kvin jaroj. La duan taskon mi faras ĝis nun. Krom tio, mi klopodas partopreni kiel eble ofte la universalajn kongresojn. La rezulto estas mirinda.

Mi estas instruisto de la angla lingvo, kaj ĝenerale oni opinias, ke instruistoj de la angla estas tre internaciaj, tamen tio ne estas vera. Ĝis antaŭ 15 jaroj, mi havis neniun korespondanton en la mondo. Mi estis hontema pri mia kapablo de la angla kaj mi ne havis

komunan temon por diskuti kun ali-landanoj, sed Esperanto ŝanĝis mian vivon draste.

Mia eseo skribado faris min "verkisto". Mi sendis la eseojn al miaj amikoj, kaj poste al **Monato** revuo. Post sep jaroj, kolektinte tiujn eseojn, mi decidis eldoni libron. En decembro de 1997, mia unua esperanta libro eldoniĝis kun la titolo **Raportoj el Japanio**. Nun mi verkas por la sesa libro de la serio.

Se mi restus nura instruisto de la angla, mia vivo estus tre enuiga. Mi vivus en Japanio sen eksterlandaj amikoj. Mi ne eldonus librojn, kiuj estus legataj internacie. Mi vojaĝus eksterlanden kiel turisto, izolita de lokanoj. Mi rete komunikiĝus nur kun japanoj en la japana lingvo, kaj kiel pacamanto, mi farus nenion. Sed dank' al Esperanto, mi havas multegajn amikojn en la mondo, mi renkontas ilin en la kongresoj, mi ricevas multajn ret-leterojn kaj mi kontribuas multe por paco kaj kompreniĝo inter popoloj, eldonante la libroserion Raportoj el Japanio.

Kio estas pli mirinda ol Esperanto? Se estus pli da esperantistoj, la mondo havus alian mienon, pli pacan kaj amikan.

Yasuo Hori
Junio 2003

Poemoj de Maria Nazaré Laroca

Fonto: <http://nazarelaroca.blogspot.com.br>



FORESTO

En la haŭtosilento
krias la foresto
de l' freŝeco de l' tempo.

Paradas jardekoj
tra l' dezerta lunlumo,
kiu penetras nun
la ĉambrojn malplenajn.

Senmovaj seĝoj
de l' manĝoĉambro.
Tute senutilaj!

Nur piedoj
la vivon trenas,
kaj la doloron
de la horoj,
kiuj ne pasas.

Juiz de Fora, 14/02/2017

SOMERE

Surstrandas
duonnudaj korpoj,
kiel ludantaj infanoj.

Jen glor' al vivo
de provizoraj
anonimuloj!

Poezio ĉeestas,
kaj plaĝo ŝajnigas
homaranan egalecon.

Cabo Frio, 04/01/2017

JARFINO


La montaron
automobiloj formanĝas
survoje al marbordo,
kie vivo kuŝas
parenteze.

Malgraŭ la brizo,
kiu malfaras la lumon
de ĉi tiu mateno
kudrita en bluo,
ankoraŭ miras
Decembro
pro eroj da memoro.

Kaj ripetiĝas
la historio
sen koncedoj.

Cabo Frio, 27/12/2016

Puzloj



Puzlo estas ludo, kiu konsistas el eroj de bildo tranĉita en multaj interkonekteblaj pecformoj. La ludisto devas interkonekti tiujn pecojn por rekonstrui la bildon. Puzlo povas esti farita de ligno aŭ papero. Ĝi estis inventita per John Spilsbury, brita kartografo kaj gravuristo. En 1767, Spilsbury kreis la unuan puzlon. Ĝi uzis mapon kiel bildo, por krei puzlon per la celo helpi knabojn lerni geografion.

Nuntempe la plejparto de puzloj estas fabrikataj mekanike, sed iuj firmoj (kiel Michèle Wilson, aŭ Wentworth) specialiĝas en manfaritaj puzloj. Iliaj fabrikistoj tranĉas pecojn en malsamaj, kelkfoje en unikaj formoj, ekzemple laŭ konturojn en la bildo, por malfaciligi la solvadojn. La fama ĉefverko de la franca aŭtoro Georges Perec, "La Vie, Mode d'Emploi" (Vivo, manlibro por uzantoj), parolas pri la fikcia puzlofaristo nomita Gaspard Winckler.

La kanada Alzheimer-Asocio asertas, ke solvi puzlojn estas bona metodo por antaŭmalhelpi ĉi tiun

Başak Aray el Turkujo

malsanon. Cetere, lerni fremdan lingvon ankaŭ malhelpas Alzheimer-malsanon.

Do, vi plibone lernu Esperanton kaj solvu puzlojn por resti sana dum via maljuneco!

Başak Aray



La Du Pinarboj

Iam kreskis du pinarboj ĉirkaŭ vilaĝo. Ili ambaŭ staris apud unu la alia tute preter telefontendoj.

La vilaĝanoj, kiuj pasis preter jenaj du pinarboj diris unu la alian: "Jenaj du pinarboj certe estas kiel du fidelaj amikoj."

Pasis tagoj, noktoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj. Tiuj du pinarboj pli kreskis kaj pli grandiĝis. Nun ili fariĝis du fortaj pinarboj.

Iun tagon aŭtune vento blovis, blovdadis kaj blovegis.

Unu el pinarboj ne povis toleri fortan blovegon kaj rompiĝinte falis sur alian arbon.

La rompita arbo diris alian sanan arbon: "Ho kara amiko, prizorgu min kelkajn tagojn. Miaj radikoj eltiriĝas. Se vi zorgus min, miaj radikoj denove kreskus kaj mi denove stariĝus. Do mi petas, helpu min por ke mi resaniĝu denove. Sed la nekompata arbo diris al rompita arbo senafable: "Ne. Ne, mi ne povas teni vin. Mi ne havas tiom da forto teni vian pezon."

Irana rakonteto

La malafabla pinarbo poste forĵetis malfeliĉan arbon kaj ĝi falis sur telefontendojn.

Aliflanke en telefonoficejo oni informiĝis ke ĉesiĝis kontakto kaj telefoni ne eblas. Tial esplorteamo veturis por esplori aferon. La esplorteamo atingis al du pinarboj kaj sciis ke pro falo de unu el pinarboj sur tendoj okazis jena problemo.

La preparistoj denove preparis disŝiritajn tendojn kaj solvis la problemon. La esplorteamanoj diris al la alia: "Eventuale denove okazos similan eventon kaj falos alia sana pinarbo sur tendoj."

Do ili decidis evitigi jenan okazon kaj per siaj hakiloj rompis ambaŭ pinarbojn la rompitan kaj ankoraŭ-sanan!

Originale perslingva poemo de Mohammad Ĝavad Mohabbat.
Enesperantigis el persa lingvo: Ali A. Kousari

Fonto : Irana Esperantisto Aŭtuno 2014

Mallonga Historio de Filozofio (15)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun John Locke kaj Thomas Reid.

Vasil Kadifeli

La princo kaj la ŝuo-riparisto; John Locke kaj Thomas Reid



Al kio vi ŝajnis kiam vi estis bebo? Se vi havas foton rigardu ĝin. Ĉu tiu estas vi? Ĉu vi memoras vin kiam vi estis bebo? Preskaŭ ĉiuj ne memoras tion. Ĉiuj kreskas, ŝanĝiĝas; la aspekto, la pensoj; niaj amikoj, niaj prioritatoj ŝanĝiĝas.

John Locke (1632-1704) pensis pri tio, kio ligis homon kun si mem kiam li estis bebo. Kiel la aliaj filozofoj li interesiĝis pri multaj aferoj. Li aplaudis la sciencajn malkovrojn, kiujn faris siaj amikoj kiel Robert Boyle kaj Isaac Newton. Post la interna milito en Anglujo li estis akuzita pri konspiracio kontraŭ reĝo Charles II kaj pro tio li forfuĝis al Nederlando. Tie li defendis siajn kontraŭajn pensojn pri la perforta ŝanĝo de la religiaj kredoj de homoj, kaj diris, ke tio estis banalaĵo. Dio donas al ni la rajton vivi, esti libera, senti ĝojon, kaj la rajton posedi aferojn. Tiaj pensoj poste impresis la fondintojn de Usono.

Locke pensis, ke ni kiel novnaskito havas cerbon kiel “**blanka tabulo**” (tabula rasa). Ni scias nenion kaj ĉiuj niaj pensoj, kredoj kaj informoj kolektiĝas kaj formiĝas dum ni kreskas. Do laŭ neniuj senco ni estas la sama persono. Ĉi tiu penso ne temas nur pri gravaj aferoj, ekzemple eĉ se vi pensas pri viaj ŝtrumpetoj la sama afero veras. Vi aĉetas novan paron da ŝtrumpetoj kaj dum tempo ili truiĝas kaj vi ilin riparas, do ili kadukiĝas kaj post longa tempo ili tute ne plu estas la originalaj ŝtrumpetoj vi iam aĉetis. Same, dum ni kreskas kaj tempo pasas, ni eble estas la sama “homa besto” sed ni tute ne estas la sama “persono”. Por tio kulpas nia konscio, la komprenemo de nia estiĝo. Locke donis ekzemplon de “princo kiu vekigiĝas kun la memoroj de iu ŝuo-riparisto”. La princo ŝajnas esti la sama homo sed li tute ne estas la sama persono pro siaj memoroj. La princo sentas, ke li estas ŝuo-riparisto, kaj li pravas, ĉar sia korpa daŭrigado tute ne estas solvo al sia problemo.

Locke pensis pri la psikologia malsano de “**multobla**

personeco” kaj diris, ke povas esti pli ol unu personeco en la sama korpo, sed se ili ne havas interligon ili tute estas malsimilaj personoj. Se la homo ne memoras, ke iam li kulpis, tiam li ne estas la sama persono. La juĝistoj eble ne liberigus tiun homojn sed Dio kiu scias ĉion tute ne punus lin (ĉi tie ni ne parolas pri mensogantojn).

La pensoj de Locke pri la persona identeco, estis ankaŭ respondo al religiaj demandoj kiel: ĉu ni bezonas nian korpon en la postmorta vivo? Laŭ Locke la korpo tute ne estas grava, tio, kio gravas estas nia identeco, t.e. nia tuta personeco. Do, vi povas esti la sama homo kun la bebo en la foto, sed se vi ne memoras vian bebecon vi ne estas la sama persono. La amplekso de nia identeco kovras nur tion, kion ni povas memori.

Kelkaj filozofoj pensas, ke Locke iomete troigis pri tiu afero. En la 18-a jarcento la skota filozofo **Thomas Reid** malkovris ekzemplon por montri la malfortecon de tiu pensmaniero: Juna soldato povas memori, ke dum li estis knabo li ŝtelis fruktojn el ĝardeno kaj pro tio oni batis lin. Poste kiam li maljuniĝas povas memori, ke dum li estis juna li estis bravulo en batalo, sed eble li ne plu povas memori la baton dum sia knabeco. Ni povas diri, ke estas ia daŭrado en la memoroj sed, laŭ Locke, ĉu ni povas diri, ke tiu homo ne plu estas tiu knabo? La teorio de Locke diras ke, kvankam la maljuna soldato estas la sama “homo” kaj “persono” kun la juna soldato, li ne plu estas la sama “persono” sed nur la sama “homo” kun tiu knabo. Eble logike tio ne povas esti vera, ĉar ni diras ke $A=B$ kaj $B=C$, tamen $A \neq C$ kio estas tute falsa. Pro tio eble ni povas diri ke la identeco ne baziĝas sur la memoroj sed sur la klinkovrataj memoroj.



Eble Locke parte fuŝis pri tiu teorio sed li faris gravan efekton en filozofio. En 1960 li verkis sian faman libron “**Eseo pri Homa Kompreno**”. En sia tempo, la regnanta skolo estis tiu de Kartezio, “**raciismo**”¹, kiu diris, ke la bazo de homa scio estas racio kaj iuj denaskaj ideoj. Locke malkonsentis kun tio kaj klarigis sian ideojn pri homa scio en ĉi tiu verko kaj kiel filozofo pri la naturo de scio li fondis la skolon de “**empiriismo**”².

Por pli da detaloj pri Locke legu la artikolon:

¹ **Raciismo** Sin. *Racionalismo. Doktrino, kontraŭa al mistiko k pragmatismo, kiu akceptas nur la sciojn bazitajn sur la racio, malakceptante la senton k la*

² **Empiriismo** *Filozofia doktrino, laŭ kiu ĉiuj ideoj devenas de la sperto.*

(daŭrigota)

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio la fondinto de (9)

EL UNUA PARTO - TAŬO



16

Kreu malplenon ĝis la ekstremo!
Konservu la kvieton ĝis la plejpleno!
Ĉiuj estaĵoj tiukaze samtempe leviĝu.
Mi rigardas kiel ili turnas sin.
La aĵoj, la kompleta kvanto,
ĉiu aĵo el ili revenas al sia radiko.
Reveno al la radiko estas kvieto.
Kvieto estas turnado al la destino.
Turnado al la destino estas la eterneco.
Ekkono de la eterno estas la klaro.
Se oni ne ekkonas la eternecon,
oni konfuziĝas kaj ekpekas.
Se oni ekkonas la eternecon,
oni fariĝas tolerema.
Pacienco kondukas al justeco.
Justeco kondukas al regado.
Regado kondukas al Ĉielo.
Ĉielo kondukas al TAŬO.
TAŬO kondukas al la daŭro.
Tiel oni ne venas en danĝeron dum sia tuta vivo.

Rimarkoj de Cezar

La „regado“ de Rikardo Vilhelmo tute kontraŭstaras al la evidenta neregemo de Laocio. Wang Chongfang tradukis: „Agante kiel reĝo li estas en akordo kun la naturo“. Alia germana fidinda tradukisto de la Dao De Jing, Ernst Schwartz tradukas: „kiu apartenas al ĉiuj estas reĝa“ (ĉe Ernst Schwartz). B. Traven iam skribis, ke li volas esti sia propra reĝo, do regi sin mem. Memregado kompreneble estas tute alia afero ol regadi ion aŭ iujn.

17

Se regas bonega reganto,
la popolo apenaŭ scias, ke li ĉeestas.
Malpli bonan reganton oni amas kaj laŭdas.
Eĉ malpli bonan oni timas.
Kaj la malplej bonan oni malestimas.
Kiel pripenseme oni devas esti rilate al siaj vortoj!
La taskoj estas plenumitaj, se la negocoj deruliĝas
normale,
jen la homoj ĉiuj pensas:
„Ni estas liberaj.“

Rimarkoj de Cezar

Laŭ Wang Chongfang Laocio pensas, ke senagado estas la plej bona principo por reganto. Regantojn, kiuj agas arbitre, Laocio evidente tute ne ŝatas. Sed registaro, kiu ŝajne ne agas, estas en vero superflua. Ĉu Laocio do estas la unua filozofa, kiu konscie volis forigi la ŝtaton? Certe ne, tiu konkludo estus troigo. Anniespera skribis al mi, ke senagado ĉe Laocio ne signifas ne fari ion, do, la registaro ĉe Laocio ne estas simple superflua, sed ĝi ne agu kontraŭ la TAŬO. Laocio vere ne volis forigi la registarojn, nur plibonigi ilin, tiel, kiel la prusa ministro Vilhelmo Humboldt, kiu volis, ke ĉiu superflua agado de ŝtato, kiu malhelpas progresojn, estu finita. Sed li konkludis aldone konsekvence, ke la ideala ŝtato estus fine tiu ŝtato, kiu progresas tute sen registaro.

Nun ankoraŭ por komparo kelkaj frazoj de la traduko de Wang Chongfang, kiuj montras laŭ Anniespera, ke en la traduko de R. Vilhelmo verŝajne frazoj perdiĝis:

„Tiu, kiuj ne meritas la fidon de la popolo,
Ne povas esti fidataj de ĝi.
Senokupaj kaj senzorgaj, la plej bonaj regantoj malofte donas ordonojn.“

Rimarko de Rikardo Vilhelmo pri la dua parto de la ĉapitro

„Bonvolu kompari al la rava popolkanto, kiun oni kantis laŭdire sub la imperiestro Yaŭ:

„Suno leviĝas, kaj mi iras al la laboro.
Suno malleviĝas kaj mi iras por dormi.
Mi fosas puton kaj trinkas.
Mi plugas kampon kaj manĝas.
La imperiestro - kion tiu donas al mi?
(Ĉion tion mi havas ne dank' al la imperiestro,
sed pro mia propra laboro.)“

Rimarko de Cezar

Anniespera trovis tiun kanteton en la ĉina lingvo kaj tradukis la enhavon por ni. Ŝi skribis al mi: „La rava popolkanto“ menciita de Rikardo Vilhelmo, estas titolita „Ji Rang Ge“ (fonetike). Nun mi provas esprimi ĝin en Esperanto“:

Kanto pri la frapado de la tero

„Kiam la suno leviĝas, mi eklaboras,
kaj kiam la suno subiras, mi ekripozas.
Mi fosas puton por trinki kaj plugas kampon por manĝi.
Al kio la Di-potenco do servu al mi!“

(daŭrigota)

Koloroj el diversaj popoloj

Je la unua de marto tutaj bulgaranoj festas tre belegan popolan kutimon. Ĝi nomiĝas "Avino Marta". Fakte Marta nomiĝas tiel pro la monato marto. Laŭ popolaj fabeloj ŝi, Marta, havas 11 fratojn, la aliajn monatojn, kaj ofte ŝi koleras al ili. Pro tio la vetero dum marto estas tre ŝanĝema.



Homoj donacas "martenica"jn al ĉiuj parencoj kaj geamikoj. Tiu "martenica" estas la simbolo por sano, fruktadono, naskiĝo, reviviĝo, printempo ks. Oni ĝin preparas ĉefe el blanka ka ruĝaj fadenoj. Blanka estas la simbolo por pureco kaj virgeco, kaj ruĝa la simbolo

Bulgarujo



de amo, forto ktp. La diverskoloraj fadenoj povas esti el koton, lano, silko ka. Eĉ la bestoj ricevas sian "martenican"! Jen infankanto kiu

rakontas, ke avino Marta donas al la tutaj infanoj ""martenicajn"" por sano kaj ĝojo.

Pli malfrue kiam la vetero varmiĝos kaj la arboj ekfloras, la martenicajn oni metas sur la arboj.

Tia maniere oni "invitas" printempon en Bulgarujo!

Mi sendas al vi tiun virtualan martenican por via sano kaj forto.



**Raportis nia kara amikino
Keti Ĝivanova**

Mi partoprenis en YO!Fest 2017



Mi estas Fatma el Turkujo. Mi provas lerni Esperanton dum pli ol 4 jarojn. Lastjare, mia instruisto de Esperanto konsilis min partopreni al la YO!FEST 2016 organizo en Strasburgo. Li sendis la ligilon al mi. Ĝi estis mia unua renkontiĝo kun TEJO. Mi aplikis al la festivalo. Kvankam mi ne povis paroli Esperanton bone, ili elektis min kaj donis min la ŝancon. Mi prenis la retan trejnadon por partoprenantoj preparita de TEJO. Mi skajpis kun junaj Esperantistoj por kelkaj fojoj. Ĝi estis tre malfacila por mi kompreni ilin. Sed, mi lernis multe. Mi estis tre ekscitita. Sed okazis akcidento al mia frato antaŭ 5 tagojn. Li restis en la intensiva zorgejo de la malsanulejo. Do, mi ne povis partopreni al YO!FEST.

Kiam mi lernis ke YO!FEST ĉijare okazos denove, mi aplikis denove. Ili rememorigis min pri la lastjaro sed akceptis denove. Mi denove prenis la retan trejnadon por partoprenantoj preparita de TEJO. Ĉifoje, ĝi ne estis tiel malfacila, kiel antaŭe. La evento okazis en la 6-a kaj 7-a de februaro en Mastroiĥto. Ni estis entute 12 esperantistoj.

Lunde vespere, okazis la malferma festo kaj koncertoj.

Fatma Eroĝlan el Turkujo

Marde, ni havis multajn taskojn. Ni preparis muron de libera esprimo. Multaj homoj esprimis sin sur tiu muro per desegnaĵoj. Plue, ni havis enketojn pri lingva diverseco en Eŭropo. En enketoj, homoj devis respondi multajn demandojn en malsamaj lingvoj de Eŭropo. Ili provis kontroli nian scion pri tio. Estis 20 demandoj. Se oni ricevis 15 aŭ pli punktojn, oni gajnis ĉokoladon. Ni ankaŭ ludis "cucumberia"n kun ne-esperantistoj. En tiu ludo, ni reprezentis malsamajn legomojn en "cucumberia lando" kaj provis protekti niajn lingvaj rajtojn. Ni parolis pri TEJO kaj Esperanto kun personoj kiuj ĉeestis niajn agadojn. Kelkaj homoj estis tre interesiĝantaj en nia organizo.

Vespere, en plenaj kunsidoj, spertuloj parolis pri malsamaj aferoj de Eŭropo. Poste, dum nokte estis multaj koncertoj.

Dum la paŭzoj, mi povis viziti kelkajn aliajn standojn kaj mi provias vidi kio alia okazis. Mi vizitis standojn de Belgio pri kuirarto kaj enmigrintoj.

Tiu estis la unua fojo por mi representi TEJON kaj la dua fojo ke mi partoprenis en okazo pri Esperanto. La antaŭa estis la 9-a MEZorienta kaj Nord-Afrika Kunveno kiun ni organizis en la centro de Anatolio en Ürgüp urbeto pasintjare en la komenco de aprilo.

Antaŭ ĉio, mi provis praktiki mian Esperanton. Mi atendis, ke la festo estu homplena sed por mi ĝi ne estis.

Fatma Eroĝlan

Fonto: <http://tejo.org/tejo-partoprenis-en-yofest-2017-en-mastrihto-nederlando/>

Foto el la retejo de TEJO. Fatma estas en la mezo. >>



Mi estis aktivulo kontraŭ Esperanto



Iam, kiel gimnazia lernanto kun amiko survoje al la lernejo, mi demandis lin kiel li pasigis la feriojn. Li entuziasmis pri sia feriumado ĉe sia avo, iama laboristo ĉe la petrolindustrio tridek kilometrojn for de ni. Li diris ke tiu

parolis al li pri interesa lingvo, facile lernebla, kiu nomiĝas Esperanto.

Mi estis tuj naŭzita. Kiom mi penis por lerni iom da angla, da latina kaj iomete da franca ! Kaj mi fieris pri tiuj atingoj. Mi spertis kiom komplikaj estas lingvaj sistemoj. Mi estis certa ke ilia komplikeco venas de ilia esprimriĉeco, kaj se Esperanto pretendas esti facila, ĝi certe ne kapablas esprimi la riĉaĵojn de la lingvoj. Pri tio mi certis kaj tion tuj diris al li.

Jarojn poste, en universitato, profesoro iun vesperon demandis nin kion ni pensas pri Esperanto, aŭ Volapuko. Nu, kion pensi ? Post iomete da pripensado, mi diris : "Tiu lingvo estas facila kaj artefarita. Kio estas tiom facila, ekzemple kun gramatiko de dek-ses reguloj, tio estas tutcerte primitiva. Kaj io artefarita ne kapablas spiri la nestvarmon de la intima homa vivo. Do, kio estas primitiva kaj artefarita, neniam en mia vivo mi volas havi ion komunan kun tio." Tion mi ne nur pensis, sed publike eldiris, kaj tio faras sulkon en la cerbo.

Do, mi restis kun tiu juĝo kaj, kiam mi havis nur la plej etan ŝancon eldiri ĝin, mi pasie provis konvinki la aliajn. Ekzemple, plurajn jarojn poste, en la tiama Okcidenta Berlino, iun dimanĉon mi staris en granda publika festo antaŭ stando – mi demonstris ion, sed ne precize memoras, kion –, kaj subite venis grupo de bulgaraj knabinoj, unu pli bela ol la alia, kaj ni komencis interbabilo – nu, ili babilis kaj mi balbutis ... en la rusa. Mi estis fiera lerninto de la rusa lingvo, kiun mi

Vilhelmo Lutermano

tiam opiniis la lingvo de la revolucio, lerninta dum kvar jaroj, memlerne, vespere antaŭ ol enlitiĝi. Kaj mi konstatis ke tiuj knabinoj gaje babilis ruse, kion mi ne komprenis, dum mi mizere balbutis kaj eĉ ne sukcesis esprimi ion kion mi nepre volis diri. Tiam la plej bela el ili diris : "Nu, kial ni ne parolas Esperanton ?" Mankis nur tio, kaj mi tuj alkraĉis ŝin : "Ĉu tiu aĉaĵo estas entute lingvo ?" Tiel agresite, ŝi levis la ŝultrojn kaj foriris kun la aliaj.

Nokte, enlite, mi pensis ke ja estas domaĝe ke mi lasis ilin tiel foriri. Sed tuj poste mi konsolis min : "Vi ja damne pravis. Kaj kiam vi pravas, vi devas diri tion. Ŝi ne diru tiajn stultaĵojn ..." Kaj mi daŭrigis mian kontraŭEsperantan propagandon.

En junio 1998, mi laboris en Bordoza, Francio, ĉar mi interŝanĝis mian laborpostenon de gimnazia instruisto pri la germana kaj la franca lingvoj por unu lernojaro kun bordoza instruisto, mi kaj mia edzino kaj li kun la lia. Ni interŝanĝis la klasojn, la domojn, la katojn, amikojn ktp. Do, iun lundan matenon mi sidis ĉe matenmanĝo – kaj komforte kaj abunde matenmanĝis (en tio mi konservis miajn germanajn kutimojn) – kaj povis fari tion, ĉar tiutage miaj lecionoj komencis nur posttagmeze.

Do, mi havis antaŭ mi ĉion por matenmanĝi : bonegan panon, buteron, kolbasaĵojn, ŝinkon, ovon, marmeladon, kafon, kaj apud mi la gazeton kaj antaŭ mi la radion. En la radio ili anoncis duhoran diskuton pri ... Esperanto ! Mi havis jam la fingrojn ĉe la butono por haltigi tiujn stultaĵojn, sed aŭdis ankoraŭ la partoprenontojn en la diskuto. Mi konis neniun, krom Brigitte Vincent, kiu estis tiam la parolantino de tiu radioprogramo de la stacio France Inter. Kaj ĉiufoje, kiam mi aŭdis tiun belan profundan voĉon, mi fandiĝis ... Do, estu ! Kompreneble ne por aŭskulti tiujn stultaĵojn, sed por aŭdi, de tempo al tempo, tiun

belegan profundvirinan voĉon.

Kaj mi direktis mian atenton for de la radio kaj alen al la gazeto. Tamen, malgraŭvole, mi ja aŭdis kion ili tie diris. Kaj kiam ili parolis pri lingva geniececo, mi eĉ aŭskultis. Jen : Diru en la franca "Nations Unies", en la germana "Vereinte Nationen", en la angla "United Nations", en la hispana, nederlanda, rusa ktp ; en ĉiuj ĉi lingvoj, la participo "unies", "vereinte", "united" ktp ne diras ĉu la nacioj unuiĝis mem aŭ ĉu ili estas unuigitaj, eble eĉ perforte, ĉu ne ? Kia diferenco inter "unuigintaj" kaj "unuigitaj" ! Sed ĉiuj ĉi lingvoj, riĉegaj "kulturlingvoj", ne kapablas diri tion en sia participo, dum tiu Esperanto senprobleme, kaj eĉ devige, esprimas tion. Mia argumento, ke Esperanto estas primitiva, estis ĝisfunde frakasita. Krome telefon Alvokis viroj kaj virinoj al la elsendo, oni aŭdis ilin saluti kaj iomete babili en Esperanto antaŭ ol daŭrigi en la franca. La interparoladetoj estis evidente flujaj kaj tute ne io, kion oni atendus de artefariteco.

Sekvis monato aŭ du da dekminutaj lecionoj en tiu radioprogramo. Normale mi ne havis tempon en tiuj momentoj, sed unufoje mi aŭdis ĝin. La parolantino Brigitte Vincent estis la lernantino, kaj anglo estis la instruisto. Mi ĝojis aŭdi la stumblojn, demandojn kaj progresojn de mia belvoĉulino kaj promesis al mi, en septembro, revene en Berlino, tuj okupiĝi pri tiu lingvo.

Monaton poste estis la someraj ferioj, kaj mi sidis sub pinarboj en ĝardeno de amiko en la Korbiera Montaro en la varma franca sudo. Jen debiciklis naŭdekjara kabilo kun longega barbo. Ni konatiĝis kaj li diris : "Ho, se vi estas berlina instruisto, diru al mi, kial estiĝas la militoj." Ni ambaŭ serĉis iom, trovis tiun kaj alian kaŭzon de militoj, kaj subite mi diris : "Estas ankoraŭ io alia. Mi ne kredas ke tio estas ĉefa aŭ eĉ nur esenca kialo, sed ĉiukaze, eĉ se la popoloj volas interkompreniĝi, tio ĝenerale ne eblas pro la lingvaj baroj." Li tuj respondis : "Ho, se vi diras tion, kial vi ne instruas Esperanton ?" Mi estis perpleksa kaj devis iom gluti. Li ne parolis Esperanton, sed estis ĝia fervora proparolanto. Mi diris: "Venontan jaron, kiam ni revidos nin, mi povos diri ion pli precizan pri Esperanto. Mi promesas al vi ke mi okupiĝos pri tio."

Revene en Berlino, mi prenis la telefonlibron kaj serĉis, sed sen vere esperi, la vorton Esperanto. Kaj jen : "Esperanto – Esperanto-Centro de Berlino ...". La viro ĉe la aparato diris ke ili loĝas survoje de mia lernejo al mia hejmo kaj ke mi povos viziti ilin per simpla halto hejmoje. Tion mi faris. Akceptis min tiu

viro – Hermann Tautorat – en la biblioteko plenplena de Esperantaj libroj, ni babilis duonhoron pri la lingvo, pri la neceso aŭ ne de la akuzativo, kaj mi foriris kun la lernolibro „Tesi la testudo”. Saman vesperon mi lernis la unuan lecionon. Sekvavespere la duan, ktp.

Mia reago al la radielsendo estis unue miksitaj. Mi hontis pro mia serioza eraro, ja ne de iu ajn, sed de lingvisto ! Mi sentis en mi la honton pro tio ke, antaŭ ol juĝi pri io, mi ne unue esploris la aferon por kompetente juĝi. Sed samtempe gajnis la ĝojo pro la nova malkovro. Mi ne nur vidis malfermiĝi antaŭ mi novan mondon, ne esperitan kaj ege interesan, sed krome mi tuj perdis certan obsedon, kiu dum multaj jardekoj turmentis min. Mi havis ĉiam la aspiro paroli france tiel ke francoj ne rimarku ke mi ne estas franco, kaj havi la saman lingvan kompetenton kiel same edukita franco. Sed, kiam mi malfermis francan gazeton, des pli se kun iom da popollingvaj tekstoj, mi devis uzi la vortaron, kaj ofte eĉ tie ne trovis la solvon, kaj tiam mi sentis min ĉiam denove humiligita. Esperanto liberigis min per la instruo, ke normala homo, eĉ kun dumviva fortostreĉo, ne povas akiri la nivelon de alilingva denaskulo de etna lingvo, ke tiuj lingvoj estas simple tro komplikaj por tio, kaj ke tia aspiro estas sensenca pretendo. Esperanto forprenis de mi tiun pezan kaj malesperigan pretendon.

Kaj mi komencis tuj naĝi en tiu nova medio ; mi spertis, ke Esperanto estas lingvo kiu perdas post iom da tempo la econ de fremda lingvo ; post jaroj da intensa uzado ĝi fariĝas propra kiel la gepatra, kun la sama esprimriĉeco, la sama sponteco kaj penstujeco, kaj eĉ povas superi ĝin. Multe pli poste mi legis en la libroj de Klaŭdjo Piron, kial tio okazas per Esperanto.

Mi partoprenis kursojn por progresintoj – ankaŭ tradukkursojn – en la "Kvinpetalo", gvidataj de Georgo, kaj pasigis la diversajn ekzamenojn, inkluzive de la „pedagogia” ekzameno. Mi tradukis multajn pecojn el la germana literaturo, sed ekde 2002 okupiĝas pri la Esperanta eldono de la franca monatgazeto de politikaj kaj kulturaj analizoj Le Monde diplomatique. En oktobro la pariza redakto de tiu gazeto subskribis kun mi kontrakton pri oficiala apero de Le Monde diplomatique en Esperanto, prizorgata de grupo de fervoraj tradukistoj (vidu ĉe <http://eo.monedidiplo.com>).

Kaj mi vivas feliĉa en mia Esperantlingva familio, en ambaŭ sencoj de "familio", ankaŭ en la "nestvarmo de la intima homa vivo".

Fonto : <http://vlutermano.free.fr/>



Ni kelkfoje vidas blankajn kolombojn en urba placo, kune kun aro da kolomboj. Homoj ilin nutras. Kontentaj estas ĉiuj. Iu blanka kolombo ofte venas en mian balkonon.

Rigardante tiun kvietan birdon, mi volus scii pri tio, kion ĉi tiu blanka kolombo pensas. Ĉu nur pri nutraĵo?

– Ĉu la birdoj revas?

– Ne! – diras iuj.

– Jes! – respondas mi. Se ili ne sonĝas tage, eblas nokte dum ili dormas.

Mia blanka kolombo revas, ke ĉie estu paco, neniam milito. Ĉu vi ne kredas je tio? Pablo Pikaso vidis tiun sonĝon.

Mia kolombo vidas la bluan ĉielon kaj la blankajn nubojn, inter kiuj ĝi flugas tiel alte, ke ĝi atingu la ĝisnune ne atenditajn altecojn. Ĉu ĝi eble bruligos siajn flugilojn? Ĉu la vento malpermesos tion? Ĉu estas danĝere? Verŝajne... sed la kolombo revas, ĝi volas vidi sian estontecon.

Ĉu ĝi sukcesos flugi trans la tempo? Se ĝi volas, ĝi povus. Laciĝante, ĝi povus sidi kaj ripozi sur iu nuboj, kiel sur la tero, kaj poste denove ekflugi.

– Ĉu ĝi montros al ni pli bonan vojon pri vivo?

– Ne! – mi diras.

Ĉu vi ne kredas je tio? Tiam aŭskultu la kanzonon “Sto Perigiali to Krifo” aŭ “En la kaŝita strando”. La poemon titolitan “Neado” verkis Georgos Seferis la greka nobel-laŭreato en la jaro 1932, kaj ĝin komponis Mikis Teodorakis en la jaro 1962.

<https://www.youtube.com/watch?v=8gX3FqegQkk>



Ĉi tiu estas poemo pri neeviteblaj ŝanĝoj en niaj vivoj, kiam ni devas forlasi aferojn aŭ homojn, kiujn ni amas kaj flegas, por ke ni pluiru en nia vivo.

Ĉu vi scias, kiaj estas la revoj de kolomboj kaj de aliaj vivuloj? Mi nun aŭskultas la muzikon kaj volas kunrevi kun mia Blanka Kolombo...

Elena Popova

Στο περιγιάλι το κρυφό
κι άσπρο σαν περιστέρι
διψάσαμε το μεσημέρι
μα το νερό γλυφό.

En la kaŝita strando
kaj blanka kiel kolombo
ni soifis en tagmezo
sed saletis la akvo.

Πάνω στην άμμο την ξανθή
γράψαμε τ' όνομά της
Ωραία που φύσηξε ο μπάτης
και σβήστηκε η γραφή.

Sur la blonda sablo
ni skribis ŝian nomon
sed bele blovis elmara venteto
kaj forviŝis tiun skribon.

Με τι καρδιά, με τι πνοή,
τι πόθους και τι πάθος
πήραμε τη ζωή μας• λάθος!
κι αλλάξαμε ζωή.

Kun kia koro, kia spiro,
kiaj deziroj kaj kia pasio
ni prenis nian vivon; malĝuste!
kaj ŝanĝis vivon.

La poemon el la greka tradukis Vasil Kadifeli

Hajkoj de Hirotaka Masaaki (Vastalto)

fiere staras
kolora tomboskribo —
velkinta kampo



blindige brilas
orfiŝoj patriotaj —
narcisoj svene



malicaj pupoj
inside sidas kune —
kameni arda



Intervjuo de Boris Kolker por Formoza Folio



Ni vivu longe, feliĉe kaj feliĉige, ni ĝuu nian esperantistecon kaj nian malfermtecon al la mondo!

Ĉu vi povus prezenti vin?

Mia nomo estas Boris Kolker.

Mia kromnomo estas Ĉiĉerono en Esperanto-lando.

Kiun profesion vi havas?

Pliparton de mia vivo mi laboris kiel tradukisto de scienca kaj teknika literaturo, ĉefe pri naftoindustrio. Antaŭ tio mi instruis la lingvosciencan, la francan kaj latinan lingvojn en universitatoj. La lastan jardekon, post la elmigro en Usonon el Rusio, mi laboris kiel oficej-estro en komputila kompanio.

Kiam vi estis knabo, kiu estis via ambicio por via plenaĝa vivo?

Mi revis fariĝi ĵurnalisto.

Kio estas via plej forta memoro pri infaneco?

Estis oktobro de la 1944-a jaro. La 2-a Mondmilito ankoraŭ daŭris. Ni revenis el Uzbekio en la liberigitan urbon Kiŝinevo (Moldavio, Sovet-Unio). Malfrua vespero. Neniu lumo en stratoj, laŭlonge de kiuj staras ruinoj de bomb-detruitaj domoj. Mi estas 5-jaraĝa.

Kio estis la unua libro, kiun vi legis en Esperanto?

“Petro”. Eldonejo SAT. Parizo. 1956 (8a eldono). Internacia lernolibro por laboristoj. Plene en Esperanto.

Kio estas via plej ŝatata libro?

“Kredu min sinjorino!” de Cezaro Rossetti.

Kiu estas la libro, kiun, laŭ vi, ĉiuj esperantistoj bezonas legi?

Ĉu estas iu dubo? Certe, “Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfekta kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta Kulturo”! Ĝia tralego egalas al tralego de biblioteko.

Kiam kaj kiel vi komencis verki?

En aŭgusto 1960, dum la 2-a Balta Esperanto-tendaro en Estonio Vytautas Ŝilas kaj mi tradukis el la rusa en Esperanton la tekston de tiam ege populara kanto “Indonezio”.

Kiel venis al vi la ideo verki lernolibrojn de Esperanto?

En februaro 1970 mi lanĉis mian amasan korespondan kurson de Esperanto, en kiu dum 23 jaroj diplomiĝis preskaŭ 900 personoj el ĉiuj regionoj de Sovet-Unio. Ĉar dum dudeko da jaroj Esperanto estis malpermesita en Sovet-Unio, mankis lernolibroj por ruslingvanoj. Tial dum du jaroj mi uzis por tiu kurso la supremenciitan lernolibron “Petro”. Ĉar mi laboris kiel interpretisto-tradukisto kun teknikistoj de la franca aŭtomobila kompanio “Renault”, kiu konstruis motoruzinon en nia urbo Ufa, mi sukcesis havigi al mi latinliteran tajpilon (nekredebla maloftaĵo tiutempe!). Mi retajpadis la lecionojn kaj sendadis ilin al miaj lernantoj. Fine mi decidis mem verki lernolibron – ja laŭdiplome mi estis instruisto de lingvoj. Mi faris tion en la 1972a jaro kaj sekvajare mi sukcesis publikigi la lecionojn en la regiona junulara ĵurnalo. Dum pli ol 40 jaroj tiu lernolibro estis perfektigata kaj reeldonata kaj nun estas konata kiel Plena lernolibro de Esperanto por ruslingvanoj.

Ĉu vi havas kontakton kun viaj legantoj?

Jes, mi estas en kontakto kun centoj da miaj lernintoj kaj legantoj.

Ĉu vi aŭtoroj havas ĉiam oportunan kajeron, en kiun ili notas ideojn kaj frazojn, kiuj trairas iliajn kapojn. Ĉu vi skribas sur papero unue kaj nur poste tajpas la tekston. Kaj vi, ĉu vi havas skribo-ceremoniaron?

Iam mi skribis notojn sur paperon. Jam delonge mi tajpas ilin en mian komputilon. Tial, kiam venas tempo por prepari novan eldonon de iu mia lernolibro, mi jam havas listegon kun eventualaj modifoj.

Ĉu vi pensas ke skrib-talento venas el disciplino aŭ naturo? (Do you think that writing talent is nurture or nature?)

Verŝajne, el ambaŭ.

Kio estus via unua konsilo por iu, kiu dezirus esti verkisto?

Rememoru iun tre interesan epizodon en via vivo, priskribu ĝin kaj konigu al viaj amikoj.

En “Vojaĝo en Esperanto-lando” oni povas legi tekstojn de multaj gravaj Esperanto-verkistoj. Ĉu vi renkontis multajn el ili?

Jenajn aŭtorojn de tekstoj mi renkontis: William Auld, Gaston Waringhien, Claude Piron, Majorie Boulton, Tibor Sekelj, Eŭgeno Bokarjov, John Wells, Trevor Steel, Hilda Dresen, Louis Beaucaire, Humphrey Tonkin, Spomenka Ŝtimec, Istvan Nemere,

Julian Modest, Vladimiro Samodaj, Nadija Andrianova, Mikaelo Giŝpling, Mikaelo Bronŝtejn, Arthur Baur, Nikola Aleksiev, Den Drown, Sergej Kuznecov, Nina Cvileneva. Legado de iliaj verkoj kaj komunikiĝo kun ili (persona kaj koresponda) riĉigis mian vivon.

Vi verkis kelkajn famajn Esperantajn lernolibrojn por studentoj de malsamaj niveloj. Ĉu vi foje pensas pri verki romanon, fikcion, verkon de teatro?

Mi pensis verki tre originalan libron pri Ludoviko Zamenhof kaj kolektis ideojn kaj materialojn pri tio. Sed mi ne trovis tempon. Kaj nun jam estas malfrue okupiĝi pri tio.

Vi estas membro de la Akademio de Esperanto; kion ĝi reprezentas por vi?


Mi estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en la 1992-a jaro kaj reelektita por du pliaj 9-jaraj periodoj. Mi kunlaboras en jenaj sekcioj: Ĝenerala Vortaro, Kontrolado de lerniloj kaj Lingva Konsultejo; la lastan mi gvidis dum 3 jaroj. La Akademia laboro ne estas tre rimarkebla ekstere, sed grava por la evoluo de Esperanto. Mi enmetas en ĝin mian kompetentecon.

Vi ankaŭ estas membro de la Akademio Literatura de Esperanto (ALE); ĉu vi povas diri al ni kelkajn vortojn pri la celo de ALE?

Ĝi estis fondita en la jaro 1983. Ĝia celo estis stimuli kaj plialtniveligi la Esperantlingvajn verkadon kaj kritikadon, kaj agnoskigi la Esperantan literaturon en kaj ekster la Esperanto-movado. Ŝajnas al mi, ke en la lastaj jaroj ALE estas malpli aktiva.

Vi verkis doktorigan disertacion pri "Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto." Ĉu vi pensas, ke kelkaj kulturoj aŭ lingvoj havis ŝlosilan rolon en la apero kaj evoluo de Esperanto?

Mi povas respondi la demandon pri la apero de Esperanto. Ĝia leksiko estas bazita sur internaciaj elementoj de jenaj gravaj eŭropaj lingvoj laŭ jena ordo: franca, angla, germana kaj rusa. En la formiĝo de Esperanto la rusa lingvo ludis la rolon de la decida kontrola lingvo: en Esperanton eniris unuavice tiuj eŭropismoj, kiuj iĝis elementoj de la rusa lingvo kaj plej ofte en la formo, kiun ili akiris en la rusa lingvo. Al la evoluo de Esperanto influis unuavice kulturoj kaj lingvoj de elstaraj Esperantaj verkistoj kaj vortaristoj. La unua periodo estis la rusa, unuavice danke al tio, ke Ludoviko Zamenhof kaj unuaj verkistoj loĝis en la Rusa imperio. Ege grava estis la franca periodo.



En "Vojaĝo en Esperanto-lando" oni povas legi pri la diktatora regado de Stalin. Ĉu vi pensas, ke junuloj ne sufiĉe konas pri tio, kion homoj kiel Hitler, Stalin kaj probable diktatoroj en aliaj landoj faris al esperantistoj?

Verŝajne, junuloj ne sufiĉe konas pri tio, kvankam estas facile alirebla la brila libro de Ulrich Lins "La danĝera lingvo". Tamen pli gravas ne la historio, sed la realo: diskonigo, lernado kaj diversspeca utiligo de Esperanto.


Vi estis kunfondinto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio), komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) kaj kunlaboris al multaj gravaj projektoj kaj agadoj. Ĉu vi pensas iam verki biografion, kie vi rakontus al ni pri ĉi tiuj spertoj?

Mia amiko Vladimir Samodaj verkis tiaspecan libron sub la titolo "Esperanto kaj vivo", por kiu mi verkis antaŭparolon. Estus alloge, se ankaŭ mi rakontus pri mia vivo libroforme. Sed, ŝajnas, ke mia malpliĝinta energio ne sufiĉos por tiu laboro. Tamen iujn interesajn epizodojn el mia vivo mi rakontis en kelkaj publikigitaj rakontoj kaj intervjuoj.

Ĵak le Puil kantas "Kiam regos am' sur ter' ", traduko de "Quand les hommes vivront d'amour", kanto de Raymond L vesque el Kanado. Li diras: "Kiam regos amo sur tero, Trobadoriĝos la soldato; for la militon, for la karceron! Sed ni jam estos mortaj, frato!". Ĉu vi pensas, ke iam amo aŭ paco regos sur tero? Ĉu vi pensas, ke venos la fina venko?

La amo kaj la paco, kaj ankaŭ la fina venko de Esperanto vivu unuavice en nia koro! Ni vivu longe, feliĉe kaj feliĉige, ni ĝuu nian esperantistecon kaj nian malfermitecon al la mondo!

**Boris Kolker,
civitano de Esperanto-lando
Fonto: Formoza Folio, N-ro 19**



4

“Ne prenu ĝin!” diris voĉo.

Malrapide, Rikardo turnis la kapon al la parolinto. Estis alta junulo, forta, larĝaŝultra. Rikardo, kiu ne dubis, ke li vidos policiston, nekredeme rigardis tiun grandan knabon, kies okuloj ridetis al li.

“Kial vi faris tion?” li demandis.

La grandulo levis la ŝultrojn.

“Mi observis vin dum kelka tempo. Laŭ via maniero rigardi, laŭ via vizaĝo, estis klare, kion vi celas. Sed mi dubas, ĉu vi vere sukcesus. Mi decidis protekti vin kontraŭ vi mem. Nu, venu kun mi. Ni iru trinki kafon en malpli brua loko, kie vi povos klarigi al mi, kial vi, videble neniam ŝtelinta, havis la strangan ideon same videble ekmalhonesti.”

Ili eliris el la stacidomo kaj post kelkminuta promenado trovis trankvilan trinkejon, en kiu ili eksidis.

Rakontante la tutan aferon, Rikardo nur malfacile povis superi sian emon plori, tiel kompatinda li sentis sin. Sekvis longa silento, dum kiu la grandulo zorge pripensis.

“Nu, mi ne estas sufiĉe riĉa por pagi al vi reveturan bileton,” li fine diris. “Sed mi povas portempe havigi al vi dormĉambron. Mi logas ĉe maljuna sinjorino, kiu forestas dum la tuta somero. Ŝi do ne kontraŭstaros, se mi lasos vin uzi la etan ĉambron, kiun ŝi dum la lernejjaro luas al studento. Mi fidas, ke vi tenos ĝin pura.”

“Vi savas min! Kiel mi povos esprimi mian dankon?”

“Tion ni vidos poste. Nun necesas, ke vi manĝu, ĉar vi diris, ke vi ege malsatas. Sed ni ankoraŭ ne prezentis nin reciproke. Mi nomiĝas Milan. Kio estas via nomo?”

5

“Ej, bonkora hundo! Kion vi faras en ĉi tiu urboparto je tia frua horo? Vi aspektas zorgplena!”

“Sandro! Kia plezuro vin renkonti! Jes, mi havas zorgojn kaj ne scias, kiel elturni min el malfacila situacio...”

“...en kiun refoje metis vin via tro bona koro, ĉu ne?”

Milan silente kapjesis.

“Prave la amikoj kromnomas vin bonkora hundo. Kiam do vi komprenos, ke ne estas via respondeco savi la tutan homaron? Lasu la homojn solvi mem siajn problemojn...”

“Aŭskultu, ĉi-foje, vere ne eblis. Jen pri kio temas.” Kaj li rakontis pri Rikardo.

“Nu, diru al li, ke nun sufiĉas,” Sandro proponis post la detala raporto. “Diru, ke tri tagoj viakoste estas la plejo, kiun vi povas akcepti. Vi loĝigis lin, vi manĝigis lin, vi estas nur studento kaj ne el riĉa familio, kiel li. Kion li faras en la vivo?”

“Ankaŭ li estas studento. Pri filozofio.”

“Kompreneble! Tiuj filozofoj havas kapon plenan je plej strangaj pensoj, sed agi praktike ili tute ne scipovas.”

“Vi pravas, almenaŭ pri tiu Rikardo. Li ne agas por solvi siajn problemojn. Li nur sidas tie, preskaŭ ploranta, kvazaŭ solvo venos el la ĉielo, se li nur montros sin sufiĉe kompatinda.”

“Vi ne faras al li bonan servon prizorgante lin. Sendu lin for. Li lernu vivi!”

“Mi devas diri, ke mi iom koleras kontraŭ mi mem. Li atendas, ke mi decidu, kion manĝi, kion fari. Li konstante sekvas min, kien ajn mi iras. Tio komencas pezi. Ĉi-matene, mi sukcesis seniĝi je li, nur ĉar estis tre frue kaj li ankoraŭu dormis, kiam mi eliris el la loĝejo.”

“Vi estas stranga. Vi ĵus diris, ke vi koleras kontraŭ mi mem. Ŝajnas al mi, ke vi devus koleri kontraŭ li. Kriaĉu al li, ke sufiĉas nun, ke li trouzas vian bonkorecon, ke vi ne plu elportas lin!”

“Tion mi ne povus. Eble estas strange, sed mi ne koleras kontraŭ li. Mi kompatas lin. Li estas tiel sendefenda en la vivo...”

“Jen vi refoje lasas vian kompatemon direkti vin kaj konduki vin al malsaĝaj decidoj!”

“Sed, se mi forĝetos lin, li... li... nu, mi ne scias, kion li faros, sed povus esti io tre danĝera. Eble la afero finiĝos per sinmortigo.”

“Nu, se tiel, estos lia decido, ne via. Vi ne respondecas pri ĝi. Vi faris vian devon, eĉ pli. Se li ne kapablas vivi sola, kial li vojaĝis al malproksima lando? Kial li ne atentis sian monon? Vi jam helpis lin pli ol necesis. Sendu lin for!”

“Kiel malvarmkora vi estas! Ne. Neniam mi povus.”

“Se tiel, akceptu lin tutkore. Fakte, nun, vi ne akceptas lin, vi trovas lin neelporteble ĝena. Sed samtempe vi lin ne malakceptas. Vi havas rilate al li du sin-kontraŭdirajn sintenojn. Tial vi suferas.”

“Vi pravas, sed viaj diroj, eĉ se plej ĝustaj, tute ne helpas min. Mi ne povas min ŝanĝi. Mi ne povus diri al li, ke mi rifuzas plu havi lin ĉe mi. Aliflanke mi amegas mian liberecon, kaj la konstanta ĉeesto de tiu ploremulo kondukas miajn nervojn al... al... kiel diri?... al koler-eksplodo.”

“Ĝuste tion mi diris al vi: koleru, kaj li forkuros!”


“Sed tiam mi ege malfeliĉos. Mi ne kuraĝos rigardi mian vizaĝon spegule. Mi diros al mi: vi estas aĉulo, kiu devis helpi malfeliĉulon, kaj, prefere ol fari vian devon, vi irigis lin for.”

“Kompatinda! Vi preskaŭ igas min kompati vin! Sed mi ne estas bonkora hundo kaj lasos vin solvi mem vian problemon. Saluton, Milan, mi esperas, ke vi tamen trovos vojon al saĝeco.”

(daŭrigota)

Vortareto		kompatinda	acımaya değer,	promenado	yürüyüş, gezinti
aĉulo	kötü herif		acınası	proponi	teklif etmek
aliflanke	öte yandan	konstante	sürekli	protekti	korumak
bonkoreco	iyi kalplilik	kontraŭstari	karşı durmak	reciproke	karşılıklı olarak
brua	gürültülü	kriaĉi	kötü şekilde bağırarak	refoje	bir kez daha
celi	amaçlamak	kromnomi	lakaplandırmak	respondeco	sorumluluk
dubi	şüphe etmek	larĝaŝultra	geniş omuzlu	revetura	geri dönüşlü
ekmalhonesti	onursuzluk yapmaya	loĝigi	birine kalacak yer	rifuzi	reddetmek
	başlamak		saĝlamak	savi	kurtarmak
emo	meyil	malsaĝa	akılsız	scipovi	bilmek
esprimi	ifade etmek	malvarmkora	soğuk kalpli	sinmortigo	intahar
fidi	güvenmek	manĝigi	yedirmek	spegule	aynadan
foresti	uzakta olmak	maniero	yol, yordam, şekil	ŝtelinta	hırsızlık yapmış
grandulo	büyük kişi	neelportebla	taşınamaz, tahammül	sufiĉe	yeterli şekilde
havigi	saĝlamak		edilemez	superi	aşmak
homaro	insanlık	nekredeme	inanmamaya meĝilli	teni	tutmak
kapjesi	kafa ile evet demek		olarak	trankvila	sakin
klare	açık olarak	observi	gözlemlemek	trouzi	fazla kullanmak
klarigi	açıklamak	parolinto	konuşmuş olan kişi	videble	göründüğü üzere
koler-eksplodo	kızgınlık patlaması	pezi	ağır tartmak	zorge	ciddiyetle
koleri	kızmak	portempe	şimdilik	zorgplena	düşünceli
		prizorgante	özen göstererekten		

Internacia Tago de Virinoj



Kuirarto

CEPELINOJ: LITOVA BONGUSTAĴO

Cepelinoj (terpomkneloj) estas la plej populara tradicia, tre satiga litova bongustaĵo origine pretigata el raspita terpomo, farĉo, rostitaj lardpecetoj kaj acidkremo. Oni asertas, ke "pracepelinoj" unue aperis en Germanio kaj venis al Litovio nur antaŭ 100-150 jaroj. La nordgermana manĝaĵo Kartoffelklöße estas parenco de la litovaj cepelinoj. Litovoj modifis la konsiston de ingrediencoj (ekuzinte porkaĵan farĉon kaj rostitajn lardpecetojn) kaj aldonis al la terpomkneloj la formon de zepelino (litove: cepelinas).

Komence cepelinoj estis nur festa manĝaĵo, ankaŭ plado de apudvojaj tavernoj. Cepelinoj tre populariĝis en Litovio dum la postmilita soveta jararo, kiam mankis multaj manĝovaroj, sed terpomoj sufiĉis, kaj ne estis grandaj problemoj pri akiro de porka farĉo. Tiutempe aperis ankaŭ cepelinoj kun kazea kaj kun funga farĉo.

Oni asertas, ke pluraj eksterlandanoj konsideras la teknologion de la cepelina preparado iom komplika. Ankaŭ ne ĉiuj litovaj mastrinoj povas fieri kuiru vere bongustajn cepelinojn. Tamen provu kaj sukcesu! Jen unu el multaj receptoj (por 4-6 personoj):



Ingrediencoj:

- Terpomoj – 4 kg,
- lardo – 200 g,
- farĉo – 1 kg,
- cepoj – 2,
- salo – preskaŭ du kuleroj,
- nigra pipro – iom da,

- acidkremo – 200 g,
- faruno – 1 kulero,
- aneto – iom da.

Preparado:

1. Unu kilogramon da terpomoj bone lavu, kuiru kunŝele, malvarmigu kaj diseretigu per viandmuelilo por fari pureon. La ceteran parton de la terpomoj senŝeligu kaj raspu subtile. El la raspajo per premo tra gaza teksaĵo ekstraktu la sukcon. La suko devas resti stari ĝis la sinko de amelo. Post tio la sukcon verŝu en la akvon, en kiu kuirigos cepelinoj. La sekan raspajon bone miksu kun la pureo kaj amelo kaj salu la terpomon knedaĵon.

2. En porkan farĉon metu etpece distranĉitajn kaj iom rostitajn cepojn, iom da salo, pipron. Ĉion bone intermiksi kaj formu oblongajn pecojn da farĉaĵo. Prenu ĉirkaŭ 80-graman terpomon knedaĵon kaj platigu ĝin surpolme. Surmetu la farĉaĵon kaj ĉirkaŭpremu ĝin per la knedaĵo. El tio ĉi per turnado inter la polmoj formu oblongajn cepelinojn.

3. La cepelinojn metu en grandkvantan bolantan kaj salitan (1 kulero) akvon kaj kuiru (por 15 cepelinoj – uzu 10-litran poton). Post kiam la cepelinoj emerĝos, daŭrigu la kuiradon dum ankoraŭ 15-20 minutoj. Fojfoje kirlu ĉion. Gravus, ke la cepelinoj ne estu dense lokitaj, por ke ili ne kungluiĝu.

Preparado de Cepelina Saŭco

Lardon distranĉu etpece kaj iom rostu, poste metu etpece distranĉitan cepon, farunon kaj ankoraŭ iom rostu. Poste verŝu iom da bolanta akvo kaj boligu ĉion dum 1-2 minutoj. Fine, enmetu la acidkremon kaj diskirlu ĉion.

Fino de la preparado!

Elprenitajn cepelinojn metu en duonprofundan teleron, surverŝu la saŭcon, superŝutu aneton.

Bonan apetiton!

Verkis: Vytautas Šilas

Fonto: La Ondo de Esperanto - 269 (2017/3) (p.57)

Vortareto		gaza teksaĵo	gazlı bez	mastrino	evsahibesi
acidkremo	ekşi krema	grandkvanta	büyük miktarlı	oblonga	ince uzun
amelo	nişasta	jararo	yıllar	platigi	yassılaştırmak
aneto	dereotu	kazeo	lor	raspi	rendelemek
apudvoja	yol kenarı	kirli	kariştir	satiga	doyurucu
bongustaĵo	lezzetli şey	knedaĵo	yoğurulmuş şey	saŭco	sos
cepo	soğan	kulero	kaşık	senŝeligi	kabuğunu soymak
diseretigi	parçala	kungluiĝi	birbirine yapışmak	surverŝi	üzerine dökmek
emerĝos	yüzeye çıkmak	kunŝele	kabuğu ile	terpomknelo	patates köftesi
farĉo	kıyma	lardo	domuz pastırması	terpomo	patates
faruno	un	manĝovaro	yemek malları	viandmuelilo	kıyma makinesi

Ĉu vi vojaĝos kun via dorlotbesto?



Multaj el ni ne rezignas pri la kompanio de niaj hejmbestoj dum libertempo, promenadoj, aŭ ferioj. Ifoje ni bezonas alporti ilin al

bestkuracisto, aŭ kiam ni translokiĝas al alia domo, aŭ en pluraj aliaj situacioj.

Estas grave memori, ke por la transportado de bestoj tra grandaj aŭ malgrandaj distancoj necesas specialaj zorgoj.

luj bestoj naŭzas pro la movado de la veturilo, aŭ tre maltrankviliĝas dum la vojaĝo. Katoj estas speciale rezistemaj al nekonataj lokoj, translokiĝoj aŭ vojaĝoj. Tiukaze, anticipu petu de veterinaro iun kontraŭnaŭzan medikamenton aŭ mildan trankviligilon. Neniam uzu tiujn substancojn sen profesia konsilado, ĉar ili povas esti danĝeraj.

Konservi la korpan temperaturon estas pli malfacile por bestoj ol por homoj. Tial ofte okazas, ke bestoj mortas kaŭze de tro alta korpa temperaturo ene de aŭtomobiloj, dum varmaj tagoj. Vojaĝu nokte, aŭ dum malvarmaj momentoj, eble kun funkcia klimato. Neniam lasu vian amikon sola, ene de la veturilo por rapida manĝado, ekzemple. Ĝi povos suferi ŝokon post kelkaj minutoj. Ne forgesu freŝan akvon kaj telereton

Same kiel ni, ĝi devos vojaĝi sekure. Hundoj povas uzi specialan savzonon, ĉar se okazos subita halto aŭ akcidento, la besto povos esti jetita kontraŭ la homoj, kaj kaŭzi gravajn vundojn al ambaŭ. Ĝi ankaŭ povas esti transportata ene de transport-skatoloj, kun adekvada grandeco kaj higiena ŝtofo, kie ĝi povos moviĝi kaj komforte ripozi.

Ne alportu katon for de via hejmo sen bona transport-skatolo, kun bona fermilo aŭ eble ŝnurligo la pordon. Katoj malfermas ĉion, escepte de pendseruro! Ne pensu alporti katon nur envolvita per tuko, en viaj brakoj.

Ne transportu beston liberigitan en veturilo. Ĝi povas ektimiĝi pro bruo, kamiono, sonavtilo, ktp. La maltrankviliĝo de vojaĝo povas okazigi batalojn, se vi transportos du aŭ pliajn bestojn. En tiuj okazoj, la besto volas kaŝiĝi en loko, kie ĝi pensas, ke ĝi estas sekura, eble ĉe la piedoj de la stiranto, sur la kontrolpedaloj. Do, la stiranto perdos la kontrolo de la aŭtomobilo kaj povos okazigi gravan akcidenton.

Fine, eliru el aŭto kun la besto ligita per kolumo kaj gvidŝnuro, ĉar ĝi povos ektimi, kuri, perdiĝi aŭ esti batpuŝita. Ne fidu, ke vi alvokos ĝin kaj ĝi revenos al vi.

Memoru: la saĝeco de besto estas ene de la kapo de la homo. Estu respondeca kaj bonan vojaĝon!

Cristina Graaf (Ilhabela - SP)

Fonto: La Lampiro #143 2017:1 (paĝo 5)

Kebekio: Ĉi tie ŝajne troviĝas la plej frua pruvo de vivo sur la Tero

Tio ŝajne estas la plej frua pruvo de vivo iam trovita sur la Tero. Teamo de esploristoj de la University College London (UCL) malkovris fosiliajn mikroorganismojn aĝajn je ĉirkaŭ 4 miliardoj da jaroj, apenaŭ kelkajn centojn da milionoj da jaroj post la supozita naskiĝo de nia planedo.

Tiuj mikrofosilioj estis identigitaj dank' al laserbildo de specimenoj de kvarco elprenitaj nord-okcidente de Kebekio. La geologia areo de la zono Nuvvuagittuq jam estas konata, ĉar la plej maljuna roko en la mondo troviĝas tie, kvankam ĝia datigo estas debatita.

La plej maljuna mikrofosilio konata ĝis nun, estis malkovrita en Aŭstralio, kaj aĝis je preskaŭ tri miliardoj kaj duono da jaroj.



Foto D.Papineau : La zono de verdaj rokoj en Nuvvuagittuq, Kebekio.

Fonto: La Hodiaŭa Ĵurnalo 4/03/2017 #105 (paĝo 4)
<https://lahodiauajurnalo.wordpress.com/>

Ŝercoj



Stultulino konsultas kuraciston pri kial ŝi misfartas. La kuracisto diras:

- Englutu unu pilolon de ĉi tiu medikamento ĉiutage, kaj vi fartos pli bone.

Post unu semajno, ŝi revenas:

- Doktoro, mi ankoraŭ havas la samajn simptomojn!

La kuracisto demandas ŝin:

- Ĉu vi efektive enprenis la medikamenton, kiun mi preskribis?

Ŝi respondas:

- Neeble, doktoro! Sur ĝia ujo estas skribite: "Tenu la boteleton fermita".

* * *

Du viroj transportas pianon tra la ŝtuparo de konstruaĵo. Sur la kvara etaĝo unu el ili decidas esplori, kiom da etaĝoj mankas ankoraŭ. Post kelkaj minutoj li revenas, kaj diras:

- Mi havas du informojn, unu bonan, alian malbonan.

- Diru nur la bonan.

- La bona estas, ke mankas nur ses etaĝoj.



Ili plu supreniras, kaj, alveninte sur la deka etaĝo, la viro demandas:

- Kio estas la malbona informo?

- Ni maltrafis la konstruaĵon.

* * *

Memorigo en necesejo:

-"Ne sidu vane, pensu pri io!"

Kruĉvort-enigmo



Horizontale

1. Ago de tiuj, kiuj esprimas sian opinion pri diskutata demando; Prepozicio montranta fizikan proksimiĝon en iu direkto;

2. Patro de patro aŭ patrino; Ago

de iu, kiu venas tien, de kie li foriris;

3. La ago parole aŭ skribe sciigi okazaĵon kun ĝiaj cirkonstancoj; Mara sedimenta kalkopetr', fajnagrajna kaj mola, precipe konsistanta el restaĵoj de mikroskopaj maraj vivuloj;

4. Instrumento aŭ aparato kiu servas por efektiviĝi ion; En kemio (en kunmetaĵoj) metala salo de alkoholo, alkoholato;

5. Trankvile senmova, senperturba, kviet-temperamenta; Virseksa infano, ankoraŭ ne atinginta seksmaturecon;


6. Frato de Moseo kaj unua ĉefpastro de la hebreatoj; La 22a grafemo de la E-a alfabeto;

7. Ago kaj vortoj de tiu, kiu instigas per parolo al la plenumo de ago aŭ devo; Prepozicio (uzebla ankaŭ kun inf.), signifanta, ke oni metas aparte la sekvantan ideon, ke oni ne konsideras ĝin;

8. La tuto de la koncernataj aferoj, aŭ ĉia ajn elemento de tutaĵo; Artefarita vizaĝo el pentrita kartono, per kiu oni kovras la vizaĝon en balo, karnavalo ks, por esti nerezonebla;

9. Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj, formantaj unu tuton; An' de skandinava gento, kiu okupis Normandion en la 9—10aj jc;

10. Aktoro, ludanta ian rolon; Ano de popolo, kiu loĝis en okcidenta Eŭropo, de Irlando ĝis Sicilio, antaŭ la invado de la keltoj;



Vertikale

1. Konstanta dilatiĝo de vejno; Konjunkcio indikanta, ke la sekvanta subfrazo estas klarigo de la antaŭa;
2. Havanta proksime la formon de ovo aŭ elipsoido; (Botaniko) De unujaraj herboj kun 2-floraj spiketoj en paniklo, ĉ. 10 sp-oj el Eŭropo kaj la Mediteranea regiono, plejparte sekejaj kaj sablejaj, kelkaj kultivataj por ornamo;
3. Solida pasto, farita el rostita kakao, sukero kaj aromaĵoj;
4. Tiu elstara part' de la brusto ĉe hominoj kaj simiinoj aŭ de la ventro ĉe la ceteraj mamulinoj, kiu entenas la laktoglandojn; Demanda partikulo, uzata en la komenco de frazo, kiam ne ekzistas alia demanda vorto;
5. (Botaniko) Speco de frakseno el suda Eŭropo kaj okcidenta Azio, kun okulfrapaj, verdete blankaj floroj en apeksaj, longaj, densaj panikloj; Delikata, agrabla kaj subtila odor' de kelkaj plantoj aŭ aliaj substancoj;
6. Io skribita, kio ricevinta sian definitivan skribformon, prezentas klaran aspekton, sen korektoj kaj makulo; Filo de Jehudo, kiu interrompis koiton, por ne gravedigi sian bofratinon, kaj pro tio estis mortigita de Javeo;
7. Patro de patro aŭ patrino; Ĉefurbo de la Minoa Kreto ĉ. 21a jc a.K.;
8. Prepozicio montranta la posedanton; Frakcio kun numeratoro egala al unu; Laŭta subita son' de la voĉo;
9. Rilata al la frato de la patro aŭ de la patrino; Purig' kaj ordig' la harojn per tiucela ilo;
10. (Inverse) Ĉio, kio malhelpas la efektivigon, elvolviĝon de io; La unua duono de la spirebla nesimpla gaso, kiu ĉirkaŭas Teron;
11. Spirita atmosfero de iu medio, loko ktp; Mallongig' de cifero aŭ numeralo;
12. Objekto (sagoj, osta kubo, bileto kun numero k.a.), kiun oni ĵetas aŭ elektas, kaj laŭ kies hazarda pozicio aŭ indiko oni ion decidas; Unuo de elektra rezistanco en la internacia sistemo de mezurunuoj kun simbolo Ω (omego);

(La solvo troviĝas en la lasta paĝo de ĉi tiu revueto)

La 102-a UK en SEULO



102-a UK, Seulo 22-29, Julio 2017

La 102-a UK ĉijare okazos en Seulo Koreio inter la 22-a kaj 29-a de julio.

<http://www.2017uk.net/>

Seulo gastigos la 102-an UK.

La ĉefurbo de Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj kaj detale dokumentitaj. Ambaŭ lokoj prezentis tre bonajn kondiĉojn por sukcesa okazigo de la plej grava Esperanto-evento de la jaro. Pri tio raportis jam pli frue la Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer kaj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães, kiuj pasintjare faris esplorviziton al ambaŭ lokoj.

-- Montrealo Kaj Seulo konkurencis pere de Facebook paĝo kaj jen la adresoj de tiuj du konkurencaj ligoj:
-- <https://www.facebook.com/Seulo-invitas-vin-731163716920145/>
-- <https://www.facebook.com/Montrealo.kongreso/>

La Universala Kongreso okazos en Seulo por la dua fojo. En 1994 ĝi gastigis la 79-an UK kun 1776 aliĝintoj. Korea Esperanto-Asocio estas unu el la plej

viglaĵ landaj asocioj de UEA. Pri tio elstare atestas ankaŭ la fakto, ke la nombro de individuaj membroj de UEA en Korea Respubliko pli ol duobliĝis pasintjare: de 52 al 112.

95 jaroj da dediĉado por Esperanto-movado

Dum 95 jaroj, koreaj esperantistoj dediĉis sin por Esperanto-movado. Korea Esperanto-Asocio okazigas nacian kongreson ĉijare kiel festo de Esperanto-amantoj. Kaj ni, koreaj esperantistoj pretas, deziras kaj montros al vi unu el la plej sukcesaj UK-oj en la historio de UEA en 2017. KEA havas rememoran feston ĉijare, nome, "Tago de Pioniroj" por rememorigi tiujn, kiuj kontribuis por Esperanto-movado en Koreio.

Kion ni faras por disvastigi Esperanton?

Ni instruadas Esperanton de loko al loko, al civitanoj, al universitatoj, kaj ankaŭ al lernejoj. Hankook Universitato de Fremdaj Studoj (HUFS), Univ. Kyongee kaj Univ. Dankook oficiale akceptis Esperanton kiel unu el klerigaj lerno-objektoj. Seula Esperanto-Kulturcentro okazigas Esperanto-Kurson por civitanoj ĉiu-monate ekde la jaro 1991.

La Majstro Mortis!



La 14-a de aprilo, Mortodatreveno de L.L.Zamenhof

La 14-an de aprilo en la jaro 1917 kaj en urbo Varsovio nia komunumo perdis sian grandan gvidanton, la kreinto de la Internacia lingvo, D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof (Ludwik Lejzer Zamenhof).

Ludoviko Zamenhof mortis dum la unua mondmilito en Varsovio okupita de germanaj trupoj, revante pri la fino de la milito, post kiu li volis kunvoki Esperanto-Kongreson. Sed la mondmilito ne volis finiĝi. Sur la manuskripto kiun L.L.Zamenhof preparis por alvoki la kongreson, li skribis unue, ke la kongreso okazu "en la lastaj tagoj de decembro 1916" en Svisio. Poste li ŝanĝis tion al "en la unuaj tagoj de aŭgusto 1917", kaj finfine li per tremanta mano skribis "post la fino de la milito".

En printempo 1917 la granda milito daŭris. En la lasta tempo de sia vivo L.L.Zamenhof pro siaj korproblemoj devis ne kuŝiĝi, nur sidi aŭ stari. En sia verko Vivo de Zamenhof Edmond Privat priskribas la lastajn momentojn de Zamenhof jene:

"Ripozi, dormi eĉ kelkajn minutojn! Unu tagon la kuracisto lin permesis momenton. Estis la 14-a de aprilo 1917. Li etendiĝis sur kanapo. Al la pordo la edzino akompanis la doktoron. Dume li sentis sin pli bone. Fine iom da ripozo, tiom sopirita! ... Sed jam li eksufokiĝis. Li volis voki. La voĉo haltis en lia gorĝo. Jen alkuris la edzino. Ŝi helpis lin residi. Ve! Jam ĉesis bati tiu koro, batinta tiel forte por homaro. Jam venis la ripozo liberiga."

La lastaj vortoj kiujn skribis Zamenhof estis laŭ la verko de Privat la jenaj:

"Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero ... ; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo ..., ke io min gardas al alta celo..."

En sia mortotago li estis nur 57-jara. Pro la milito la landlimoj estis fermitaj kaj krom la familio nur varsoviaj esperantistoj povis ĉeesti la enterigon de Zamenhof. Nur iom post iom la informo pri lia morto atingis la esperantistojn dise en la mondo. La verkisto Julio Baghy troviĝis en militkaptiteco en Siberio, kiam li eksciis pri la morto de la iniciatinto de Esperanto li verkis sian faman poemon "La majstro mortis", tamen,



ke Zamenhof mem neniam ŝatis esti nomata "majstro".

*Ne estis mi tie,
Preĝante plorpie:
Katenis min sklave Siberio.
La famon, ne brue,
Nur poste, malfrue,
Simile al eĥo de mortkrio
Mallonga sciigo alportis:
„La Majstro mortis!“*

*Sed scias mi sente,
Ke oni sensente
Plezurojn pelante babiladis,
Eĉ kiam plorante,
La ĉerkon portante
Amaso funebra trapaŝadis.
Mallonga sciigo alportis:
„La Majstro mortis!“*

*Por ili, jen, homo,
Eĉ malpli—nur nomo
Sin kaŝis por ĉiam en la ĉerko;
Por ni, funebrantoj,
Por pacbatalantoj
Ĝi gardas kreinton de Mondverko.
Mallonga sciigo alportis:
„La Majstro mortis!“*

Ne, kontraŭ ĉiuj tiuj diraĵoj L.L. Zamenhof ne mortis. Li ankoraŭ vivas en la koro de Esperantistoj, en ĉiu vorto de lia kara lingvo, kaj en ĉiu ero de la esperanta movado. Jes por li morto ne estis malapero, lia kreaĵo la Lingvo Internacia, kaj lia memoro en la esperanta komunumo, kiun li mem kreis kaj gvidis por multaj jaroj, gardas nun lin al alta celo.



El artikolo de Libera Folio en 2005-04-14 :
http://www.liberafolio.org/2005/persono/zamenhof_morto

Simpozio en Poznan kun la temo: Lernanto en la Lingvolerna Procezo

La 8-an de februaro 2017, meze de la tutsemajna studprogramo de la Interlingvistikaj Studoj kaj Instruista Trejnado okazis tuttaga simpozio kun la temo: "Lernanto en la lingvolerna procezo". La aranĝon organizis prof. Ilona Koutny kaj partoprenis ĝin la studentoj de la du kursaroj, ties prelegantoj kaj ankaŭ kelkaj, nur por tiu tago alvenintaj, gastoj.



La tuttagan programon malfermis la vicdirektorino de la Lingvistika Instituto de la Universitato UAM, prof. Grażyna Demenko. La 14 prezentaĵojn de 12 spertuloj el ses landoj (Brazilo, Hungario, Italio, Nederlando, Pollando kaj Usono) kun intereso sekvis pli-malpli kvindekmembra publiko. Post la malferma

prelego de Duncan Charters el Usono, prelegis laŭvice Vilmos Benczik (HU), Renato Corsetti (GB), Przemysław Grzybowski (PL), Grażyna Szubryczyńska (PL), Krystyna Worobiej (PL), Małgorzata Komarnicka (PL), Katalin Kovats (NL), Blazio Wacha (HU), Stefan MacGill (HU), Fernando Pita (BR), Ilona Koutny (PL) kaj denove Renato Corsetti (GB) kaj Blazio Vaha (HU).

Kadre de la postsimpozia kulturvespero la ĉeestantoj en kortuŝa kaj inda memorfesto omaĝis al la ĵus forpasinta profesoro de la Interlingvistikaj Studoj, Zbigniew Galor kaj spektis prezenton de Przemek Grzybowski pri sociologia temo "Projekto Belen".

Fotojn pri la aranĝo vi povas vidi en la publika Facebook-paĝo de edukado.net :

<https://goo.gl/QfNTk8>

La raporto de Stefan MacGill, kun mallongaj resumoj elŝuteblas ĉi tie :

<https://goo.gl/3k4fVJ>

Katalin Kovats

Fonto: Eŭropa Bulteno, Februaro 2017 #168

Heroldo stumblas, sed ne falas kaj jam planas sian jubileon



Heroldo de Esperanto estis aĉetita de mi kaj Paulo Lima kaj ĝis la fino de septembro grandaj planoj estis faritaj.

Ekestis grandaj espero

kaj scivolemo pri la nova Heroldo en la manoj de la eksredaktoro de la revuo Esperanto, aŭtoro de ĉi tiu artikolo, kaj lia partnero en la entrepreno Sociala Grupo Lexus. La planoj estis tre ambiciaj: lanĉo de reta versio, papera versio kun 20 plejparte koloraj paĝoj, aldono de novaj temoj (ekonomio, edukado, arto kaj kulturo, sportoj, politiko) flanke la tradicia temo "Esperanto". Sed eĉ pri Esperanto estis rompo de la tradicio, ĉar la temo Esperanto estos traktita specife kaj fakte kiel tri temoj: Agado por Esperanto, Agado per Esperanto, kaj Lingvoj (pri Esperanto kaj ĉiuj ceteraj lingvoj).

Sed ni estas jam survoje al la fino de la tri unuaj monatoj de la jaro, kaj eĉ la reta versio de Heroldo ankoraŭ ne estis lanĉita. Kio okazas? Ĉu Heroldo mortis en la manoj de la brazilanoj?

Legu la tutan artikolon ĉe:

<http://sezonoj.ru/2017/03/heroldo-6/#more-10144>

Fonto: La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2017/03/heroldo-6>

Slovakio invitas: SES 2017



SES-2017SES estas la plej granda internacia Esperanto-renkontiĝo, celanta lernadon de Esperanto. Ĉiujare, ekde 2007 ĝi okazas somere en Slovakio. Post unujara paŭzo (kaŭzita de la 101a UK en Nitro) SES revenas. Ĝia programo krom instruado konsistas ankaŭ el akompanaj kultur-amuzaj programeroj. La Someran Esperanto-Studadon organizas E@I kaj Slovacia Esperanta Junularo (SKEJ).

Legu la tutan artikolon ĉe:

<http://sezonoj.ru/2017/02/slovakio-15/#more-10117>

Fonto: La Balta Ondo La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2017/02/slovakio-15>



Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

LECIONO PRI "IST"

lun tagon la instruistino diris al la infanoj la signifon de la silabo "ist" aldonita al vorto.

"Mi estas instru-ist-ino, ĉar mi instru-as infanojn," diris ŝi. "Ĉu vi komprenas tion?"

"Jes, ni komprenas tion," respondis la infanoj.

"Donu al mi, do, pluan ekzemplon, Roĝero"

"Dent-isto-o estas persono, kiu elprenas dent-ojn."

"Mi ne amas dent-ist-ojn," diris Johano. "Mi mal-amas ilin."

"Silentu, Johano! Nu, Ŝila!"

"Pian-ist-o estas persono, kiu ludas la pian-on, kaj violon-ist-o estas persono, kiu ludas la violon-on."

"Mi donos ekzemplon," kriis Roĝero. "Abel-ist-o estas persono, kiu gardas abel-ojn."

"Kaj bovin-isto estas persono, kiu gardas bovin-ojn," kriis Ŝila.

"Kaj ŝaf-ist-o estas persono, kiu gardas ŝaf-ojn," kriis Roĝero per laŭta voĉo.

"Kaj ĝarden-ist-o estas persono, kiu laboras en ĝarden-oj," kriis Ŝila per pli laŭta voĉo.

"Kaj labor-ist-o estas persono, kiu laboras," kriis Roĝero per ankoraŭ pli laŭta voĉo.

La instruistino metis la manojn al la oreloj. "Silentu! Silentu!" ŝi petis. "Mi surd-iĝ-os, se vi parolas tiel laŭte."

"Johano! Kion faras via patro?"

"Mia patro estas verk-ist-o," respondis Johano. "Li verkas librojn."

"Kaj kio mi estas?"

"Vi estas instru-ist-ino."

"Kaj kio vi estas, Johano?"

"Ho, mi? Mi estas bona, bela, lerta, diligenta museto," respondis Johano ridante.

"Ho, ne Johano! Vi estas nur lern-anto, kaj ne tre diligenta lern-anto... Ŝila. Kion vi volas fari, kiam vi estas granda muso?"

"Mi estos flor-ist-o, ĉar mi tre multe amas florojn."

"Kaj vi, Johano?"

"Ho, mi estos kriket-ist-o dum la somero ¹, kaj futbal-ist-o dum la vintro."

La instruistino diris. "Kaj vi, Roĝero?"

"Mi estos aŭ lokomotiv-ist-o aŭ mar-ist-o," respondis Roĝero.

"Nu," diris la maljuna griza muso, "mi opinias ke vi nun komprenas la signifon de la sufikso "ist". Vi povas nun ludi en la ĝardeno. La suno brilas, kaj estas tre varme. Dum la somero, la infanoj devus ludi en la sunbrilo. En Angl-uj-o la suno ne ofte brilas dum la vintro. Ludu, do, miaj infanoj, dum la suno brilas."

La infanoj kuris ĝoje en la ĝardenon.

¹ La nomoj de sezonoj estas: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro.

Sözlük		floro	çiçekçi	(edat)
abelisto	arıcı	futbalisto	futbol oyuncusu	pianisto
abelo	arı	futbalo	futbol (daha iyisi "pied-pilko")	piano
aldonita	ilave edilmiş	ĝardenisto	bahçevan	pli
Angl-ujo	İngiltere	gardi	korumak	plua
ankoraŭ	daha, henüz	ĝoje	mutlulukla	respondi
bovisto	inek çobanı, inek yetiştiricisi	kriketisto	kriket oyuncusu	ridante
dentisto	diş doktoru	laŭta	yüksek ses	ŝafisto
dento	diş	lerta	becerikli	ŝafo
devus	yapmalı, yapmalıydı	lokomotivisto	lokomotif sürücüsü	signifo
diligenta	çalışkan	malami	nefret etmek, sevmemek	sunbrilo
do	dolayısı ile	maristo	denizci	surda
doni	vermek	meti	koymak	surdiĝi
dum	boyunca, sırasında	nu	hmm, şimdi, iyi (ingilizce'deki "well" kelimesi)	tiel
ekzemplo	örnek	ofte	sıklıkla	tio
el-preni	alıp çıkarmak	opinii	fikri olmak	verki
fari	yapmak	orelo	kulak	verkisto
floristo	çiçekçi	per	ile, aracılığı ile	vintro
				violonisto
				violono
				vorto
				kiş
				kemancı
				keman
				kelime

Ekler:

- ist- kelime anlamından meslek adı yaratır
- in- Kelimeye dışı anlamını veren ek
- uj- kelimeye kap ya da ülke anlamını verir



Organizaĵo de la Unuĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo

La 100^a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof

Solenata sub la aŭspicio de UNESKO



Birleşmiş Milletler Eğitim, Bilim ve Kültür Örgütü

Ludwik Zamenhof 'un 100. ölüm yıldönümü

UNESCO işbirliğiyle anma etkinlikleri yapılacaktır

Renkontiĝo kun la prezidanto de TEJO

Je la 23-a de februaro la prezidanto de TEJO, Michael Boris Mandirola vizitis Istanbulon, kaj okazis malgranda renkontiĝo.

En la renkontiĝo partoprenis Başak Aray, Fatma Eroĝlan, Eser Ser, Mete Erol, Neriman Erol, Öykü Erol, Murat Özdizdar, Vasil Kadifeli kaj nia hispana amiko Nicholas.

Le ĉefa temo estis kiel fondi junularan asocion kiu reprezentos TEJO en Turkujo. Ni parolis pri la malfacilaĵoj de asocio fondado en nia lando.

Plue ni parolis pri kiel ni prezentos Esperanton sabate je la 25-a de februaro en seminario pri informadiko al

grupo de junuloj. (Por pliaj informoj vidu la 2-an paĝon).



Kapaniŝ - Fermo



Bir dergimizin daha sonuna geldik.

Bu sayıda sizlere önemli okunacak yazılar sunduk. Umarız bir kaçını okumuşsunuz ve dergimiz dilinizin gelişmesine katkıda bulunmuştur.

Çok güzel bir haber olarak, Ocak ayı Esperanto Sumoo kitap okuma günlerine katılan bir esperantist okumak için bizim dergimizi seçmiş.

Siz de bunu yapabilirsiniz. Hem Sumoo'ya katılmış olur hem dergiyi okumuş olursunuz !

Ni estas en al la fino de alia revueto.

En ĉi tiu numero ni prezentis al vi gravajn kaj legindajn artikolojn. Ni esperas ke vi almenaŭ legis kelkajn de ili kaj nia revueto kontribuis al la pliboniĝo de via lingvo.

Kiel bona novaĵo ni ŝatu menci, ke en la januara Esperanto Sumoo iu partoprenanto elektis legi nian revueton.



Vi ankaŭ povas fari la samon. Ĉi maniere vi ambaŭ partoprenos en la Sumoo kaj legos la revueton !

Sonraki sayımızda buluşmak üzere...

Ĝis revido en la venonta numero.



**Yaz Esperanto-Öğrenimi (SES 2017)
15 ile 23 Temmuz 2017**

tarihleri arasına gerçekleşecektir.

SES 2017, tarihi Slovak ŝehri Banská Ŝtiavnica da yapılacaktır. Ŝehir Slovak başkenti Bratislava'dan 140 km, Macaristan başkenti Budapeşte'den 105 km uzaklıkta bulunmaktadır.

Eğitim program bir kaç parçadan oluşacaktır:


- Öğleden önce: Esperanto eğitimi;
- Öğleden sonra: gezi, konferanslar, el işleri, spor, çalışma grupları vs;
- Akşam: Ulusal ve Uluslararası akşamlar, konserler, filmler, diskotek...

(Esperanto-öğretimi tecrübeli Esperanto öğretmenleri tarafından kişinin dil seviyesine göre 5 ayrı grupta yapılacaktır)

<http://ses.ikso.net/2017/>

Serio Oriento-Okcidento, n-ro 51
Sub aŝpicioj de UEA
en Konsulta Partnereco kun Unesko

Nazim Hikmet Ran



Poezia antologio

El la turka tradukis Vasil Kadifeli

Mondial

ALVOKO pri nova angulo



Karaj geamikoj, Ni volas krei angulon en Turka Stelo nomita "Koloroj el diversaj popoloj" en kiu ni publikigos tekstojn pri arto, kulturo, festo ktp el diversaj landoj kaj nacioj. Se vi volas verki malgrandan tekston (almenaŭ duono de A4 papero) kaj aldoni almenaŭ unu foton kaj se eblas unu ligilon al Jutubo ni ŝatus publikigi ĝin en nia revueto.

Solvo de la kruĉvort-enigmo

